

V-9252/11
(1984)

1984 junio
77a jaro
n-ro 942 (6)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



**Finnaj edukistoj
rekomendas favore**



Vi trovos,

ke la redaktoro ŝanĝiĝis. Ŝanĝo de revua redaktoro tamen ne nepre signifas ŝanĝon en la revuo. Du kuiristoj povas sekvi la saman recepton. Sed bonvolu imagi dum momento, ke vi regule vizitis unu el viaj plej ŝatataj restoracioj, kie vi dum pli ol dudek jaroj ĝuadis gustumi, frandi, eble foje eĉ vori el la tie proponitaj manĝaĵoj. Kiel vi do respondus al la kuiristo, kiu iun tagon diris al vi: "Ekde nun vi mem preparos la manĝaĵon por la gastoj!"? Tio estas la sorto de la nova redaktoro. – Mi konatiĝis kun la revuo ekde 1964. Fakte mi lernis de ĝi, aŭ pli ĝuste de ĝia tiama redaktoro Victor Sadler, Esperanton. Tio estis duoble feliĉa tempo, ĉar mian nacian revuon *La brita esperantisto* redaktis Edward Ockey. Kiam Simo Milojević transprenis la redaktorecon de revuo *Esperanto* en 1974, eblis ĝoji, ke ĝi retenis sian bazan karakteron. Similan politikon havas la nova redaktoro. Tamen ŝanĝoj okazos, kiel en ĉiu vivanta organo. La ĝusta celo de ĉiu lernanto estas superi sian instruiston, kvankam trafi estas pli malfacile. Sed nun mi iros al mia plej ŝatata restoracio kaj deziras ankaŭ al vi: "Bonan apetiton!".

Enhavo

- 101 Instruado: Ministeria esplorgupo pri Esperanto
- 102 Denove aŭkcio en Vankuvero
- 103 Lingvo: Interlingvistika simpozio (W.A. Verloren v. Themaat)
- 104 Afriko: Zairiano en Eŭropo; Studenta entuziasmo en Ŝanhajo
- 105 Informado al eŭropaj parlamentanoj en Belgio
- 106 Reagoj: Pli pri "Usono"; Abomeninda eŭropismo
- 107 Argumentado pri Esperanto en brita televida teatraĵo; Instituto Hodler: Nur du subvencioj; Nova statuto de GEA
- 108 Kongresoj: Jubilea kongreso de fervojistoj (G. Ritterspach)
- 109 Kongresa Komunikado (novaĵoj pri la 69a UK en Vankuvero)
- 110 Kial nacilingvaj paroladoj? (H. Tonkin); Eduka Fondaĵo Carson
- 111 Recenzoj: *Sferoj 2*; *Sciencfikcio kaj fantastoj* (R. Cash); *La Trombonoj de Jeriko* de R. Schultz (D.B. Gregor); *Sur la bordo* de N. Shute, (Jiang Hongzhang); *Rakontoj pri Afanti*; (G. Cansdale); *Apliko de komputiloj en industrio kaj administrado*, red. I. Koutny (Zyun'iti Sibayama); *La mirakla insulo Baratario* de S. Gesell, (Jozef Hartl)
- 114 Laste aperis (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 115 TEJO-paĝo: Pri perforto en Rimini; Festivalo en Moskvo.
- 116 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 118 Nekrologoj (E. Champy, B. Cosenza, S.V. Filippov, K. Härnqvist, W. Kaukel, B. Lindström, M. Marciniak, H.W.R. Petersen, H. Petersson, J. van Selms, G. Spertini)
- 119 Anoncetoj; Oficiala informilo de la Centra Oficejo de UEA
- 120 Esperanto en radio (G. Larglantier)

La kovrilo

Finnlando, lando konata pro siaj lagoj, arkitekturo kaj vintra neĝo. Ĉu la infanoj jubilas ankaŭ pro la apero de la oficiala raporto pri Esperanto al la lernejaj aŭtoritatoj de sia lando? Ĉiuokaze ni en aliaj landoj havas kialon por ĝoji pri tiu bone utiligebla raporto: plia rezulto de tiu serioza laboro, kiun oni komencis en la finna vilaĝo Somero. Ĝuste kiom tio signifas varmigon de la eblecoj por Esperanto-instruado, legu en nia ĉefartikolo.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Redaktoro: Geoffrey Sutton.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 44; US \$ 18; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakvirlaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20 %.

Banko: Bank Mees & Hope, 's Graven dijkwal 108, 3014 EJ Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto (financo, administrado): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto (esploroj, rilatoj kun UN): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; ☎ (315) 265 6744.

Vicprezidanto (informado): s-ro Yosimi Umeda, Tabata 1-28-13-206, Kita-ku, Tôkyô, 114, Japanio; ☎ (03) 828 6603.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23 274.

Estrarano (planado, Jubilea Jaro, landa agado): d-ro Renato Corsetti, Via Collazia 21/1, I-00183 Roma, Italio; ☎ (06) 75 85 679.

Estrarano (eksteraj rilatoj, junularo): d-rino Barbara Despiney, 3 rue Alphonse Daudet, F-75014 Paris, Francio; ☎ (1) 540 90 32.

Estrarano (kongresoj): s-ro Roland Lindblom, Stenbockens gata 109, S-136 62 Handen, Svedio; ☎ (08) 777 41 75.

Estrarano (kulturo, edukado): s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Estrarano (faka agado, aplikado de Esperanto): inĝ. Petăr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

Ministeria esplorgrupo pri Esperanto

Jam de multaj jaroj Esperanto-Asocio de Finnlando kaj Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj (ELFI) flegas rilatojn kun naciaj instancoj por edukado en sia lando. La eksperimenta instruado de Esperanto en Somero en 1958-63, gvidita de rektoro Joel Vilkki, estas vaste konata. La oficiala raporto pri tiu eksperimento pruvis superecojn de Esperanto. Oficialuloj ĝin pli-malpli enarkivigis, sed finnaj Esperanto-organizaĵoj sciis utiligi ĝin kiel premon. Sekvis en 1974 (vd. revuon *Esperanto*, p. 186 de tiu jaro) agnosko de la Eduka Ministerio pri la bonaj rezultoj el Somero. La Ministerio skribis i.a.: "Al la lingvoprogramo de la baza lernejo Esperanto konvenas en la pozicio de la tria elektebla fremda lingvo. Kaj en la baza lernejo kaj en la liceo Esperanto devas havi la rajton esti instruata en specialaj kursoj kaj/aŭ en lingvoklubo."

La 30an de septembro 1982 la Eduka Ministerio de Finnlando starigis laborgrupon, kies tasko estis esplori la nunan situacion de instruado de Esperanto

en la lando kaj la intereson pri studado de Esperanto en plenkreskula edukado, kiel ankaŭ fari proponon pri organizado de Esperanto-instruado en la postmezgrada edukado. Prezidis la grupon altlerneja konsilisto Hannes Jumppanen. Inter la membroj estis instruisto Pentti Järvinen nome de ELFI.

Tiun 57-paĝan raporton *Opetusministeriön esperantotyöryhmän muistio* (Raporto de la Esperanto-laborgrupo de la Eduka Ministerio, ISSN 0359-761X) la laborgrupo transdonis al la Ministerio la 30an de marto ĉi-jare.

Komence en la raporto la grupo prezentas karakterizajn trajtojn de Esperanto kaj konstatas, ke ĝi obeas la samajn leĝojn kiel aliaj lingvoj. La grupo traktis ankaŭ la internacian uzon, internaciajn organizaĵojn, literaturon, gazetaron kaj aliajn kulturformojn de Esperanto.

En la pritrakto de la monda situacio de la Esperanto-instruado, la laborgrupo konstatas, ke precipe la universitata instruado vigliĝis dum la lastaj jaroj. Oni



Haveno en la ĉefurbo de Finnlando, malantaŭ kiu troviĝas la ministerioj, interalie la Ministerio por Edukado.

aparte mencias la ekzemplojn de Ĉinio kaj Hungario. Oni kompreneble atentis la rezultojn de instru-eksperimentoj kaj ripetas la konstaton el Somero, ke prepara kurso de Esperanto plibonigas lern sukceson en studado de aliaj fremdaj lingvoj. La grupo koncize prezentas la situacion de Esperanto en scienco kaj tekniko.

Unu ĉapitro traktas instruadon de Esperanto en Finnlando. Laŭ ĉi-jara raporto de la lerneja administracio Esperanto estas la deka el inter 27 institucie instruataj lingvoj. (Tio inkluzivas la finnan kaj svedan – la oficialajn lingvojn de la ŝtato.) De 1982 ĝis 1984 oni instruis la Internacian Lingvon tra Finnlando en 23 institucioj dum 1 207 horoj.

Krome la laborgrupo priskribas la Movadon en Finnlando kaj la rezultojn el enketo, direktita al uzantoj de Esperanto.

Ni citas el la Esperanta resumo:

”La laborgrupo konstatas, ke la avantaĝoj de Esperanto, precipe la facileco en ĝia alproprigo, ĝia neŭtraleco en internaciaj rilatoj kaj ĝia signifo en edukado al internacieco, estas nekontesteblaj. Tial Esperanto devus esti instruata pli vaste ol nun.

La laborgrupo proponas:

- ke oni organizu instruadon de Esperanto en la civitanaj kaj laboristaj institutoj, popolaltlernejoj kaj studcentroj pli vaste ol nun. Krom tio oni devus organizi instruadon en radio, televido, someruniversitatoj kaj per korespondaj kursoj;
- ke por apogi la instruadon, Esperanto-organizaĵoj kaj aŭtoritatoj devus kunlabore produkti inform-, stimul- kaj studmaterialon;
- ke la ekzamenkomisiono pri plenkreskula studado kune kun Esperanto-organizaĵoj planu kaj organizu tutlandajn ekzamenaranĝojn same kiel en aliaj landoj;

- ke universitata Esperanto-lektoro havu rajton doni atestojn pri lingvoscio;
- ke por plialtigi kaj unuecigi la instruadon estu organizita universitata studprogramo 15-semajna por estontaj instruistoj de Esperanto. Celo de la studprogramo estus konatigi studenton kun Esperanto, ties historio kaj literaturo, prezenti aliajn internaciajn lingvojn, kaj konatigi al studento internacian uzon de naciaj lingvoj. Krom tio oni organizu kompletigan edukadon por la Esperanto-instruistoj jam instruantaj;
- ke en la lingvocentroj oni organizu Esperanto-instruadon laŭhore;
- ke en unu finna universitato estu lektorato pri Esperanto kaj aliaj internaciaj lingvoj [supozeble ’planlingvoj’]. Surbaze de sukcesaj instru-eksperimentoj la laborgrupo opinias inde rekomendi ankaŭ enkondukon de prepara Esperanto-kurso en la elementajn lernejojn. Krome oni rekomendas al lernejoj por la kluba laboro utiligon de Esperanto en edukado al internacieco.”

La laborgrupo faris konkretajn proponojn laŭ la peto de la Ministerio. Ni ankoraŭ devas atendi, antaŭ ol scii ĝis kiu grado la aŭtoritatoj akceptos tiujn proponojn. Por ni, tamen, eble la plej grava aktuala signifo de la raporto estas ĝia elstara uzebleco kiel ekzemplo de serioza oficiala traktado de la bezono de Esperanto-instruado. Niaj instruistaj organizaĵoj kaj landaj asocioj nun havas plian konkretan eblecon influi edukministeriojn en aliaj landoj, tiel ke ankaŭ ili sekvu la finnan ekzemplon kaj serioze rilatu al la Internacia Lingvo.

La raporto estas havebla de: Opetusministeriö, Korkeakoulu- ja Tiedeosasto, Suunnittelu- ja Tutkimustoimisto, Rauhankatu 4, SF-00170 Helsinki 17.

Geoffrey Sutton

Denove aŭkcio en Vankuvero

Raraj libroj, poŝtkartoj kun subskribo de Zamenhof, insignoj kaj aliaj memoraĵoj de fruaj Universalaj Kongresoj, interesaj fotoj, Esperanto-poŝtmarkoj – jen kelkaj el la objektoj, kiujn vi trovos en la Aŭkcio ĉi-jare dum la Universala Kongreso.

La Aŭkcion oni aranĝas ĉefe por gajni monon por la Esperanto-agado en la Tria Mondo, kie lastatempe (kiel vi rimarkis en tiuj ĉi pagoj) okazas impona kaj ekspluatenda kresko de intereso pri la Internacia Lingvo.

Se vi venos al Vankuvero, nepre planu veni al la Aŭkcio kaj tie ankaŭ fari viajn aĉetojn. La vendo-

taj varoj estos ekspoziciataj en la aŭkcia salono tuj antaŭ la anoncita horo: 17.30, ĵaŭdon, la 26an de julio.

Sendepende ĉu vi venos al Vankuvero aŭ ne, vi povas kontribui varojn al la Aŭkcio. Sendu ilin al la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (kiel eble plej baldaŭ) aŭ sendu kaj portu ilin al la Universala Kongreso en Vankuvero (adreso: 53 North Boundary, Vancouver, B.C., Kanado V5K 3S4). Ĉion oni vendos profite al Fondaĵo Azio-Afriko de UEA.

La aŭkcianto en Vankuvero estos d-ro Humphrey Tonkin, konata kiel estrarano de UEA kaj kiel lerta rolanto en antaŭaj aŭkcioj. Vi ne bedaŭros vian ĉeeston en tiu unika programero.

Scienca Interlingvistika Simpozio

Ni ĉi-sube mallonge raportas pri la 12a Scienca Interlingvistika Simpozio apud Varsovio. La nombro de okazintaj simpozioj pri interlingvistiko montras ilian sukceson. Ili krome estas tiaj kunvenoj, kie movadanoj kaj ekstermovadanoj renkontiĝas por serioze diskuti evoluojn en tiu scienco. Tiaj renkontiĝoj estas gravaj. La organizanto, Akademia Centro Interlingvistika (Rada Naczelna ZSP, ul. Ordynacka 9, PL-00-950 Warszawa, Pollando) planas okazigi sian 13an Simpozion en aprilo venontjare. Interesitoj cetere notu, ke ĵus aperis la presita prelegaro de la pasintjara 11a Scienca Interlingvistika Simpozio. Ĝi espereble baldaŭ estos mendebla de la Libroservo de UEA.

La 12a Scienca Interlingvistika Simpozio okazis de la 27a de aprilo ĝis la 1-a de majo en Ŝtata Instituto por Forstokulturo apud Varsovio. Laŭ mia takso minimume duono de la partoprenantoj mem prelegis. Ili prezentis 26 prelegojn, divideblajn sub sep rubrikojn:


Neplanlingvoj kun devianta sociologia tipo: "La jida lingvo en translima komunikado" de Tadeusz Michalski, "Kriptaj lingvoj en Meza Azio" de Jadwiga Pstrusińska, "La latino sine argumentatione" de Jozo Marević kaj "La sanskrita kiel interlingvo de la hinda kulturo" de Jędrzej Wojtakowski. Kvankam tiuj prelegoj koncernas Esperanton ne rekte, ili estis tre utilaj por meti ĝin en pli larĝan kulturhistorian kadron. Ili montris la grandan diversecon de la sociologiaj tipoj de la homaj lingvoj kaj tial metas Esperanton en pozicion malpli izolitan, ol oni emas, se oni kontrastigas Esperanton kiel "artefaritan" lingvon kontraŭ naciaj normlingvoj – kvazaŭ ĉi tiuj estus la solaj homaj lingvoj iam funkciintaj. Aparte interesa estis la prelego pri la sanskrita kaj la riĉa, altnivela kaj multflanka kulturo kreita en ĝi longe post kiam ĝi ĉesis esti popola lingvo.

Interlingvistiko: "Pri la kaŭzoj de la malkonsentoj en la interlingvistiko" de W.A. Verloren van Themaat. Li argumentis, ke la malkonsentojn kaŭzas ĉefe malsamaj opinioj pri la politika kaj kulturfilozofia bazo de la planlingvo, kaj konfliktantaj pretendoj de diversaj disciplinoj. Plimulto de la diskutantoj, i.a. Münnich, opiniis, ke Verloren van Themaat sub-

taksas la kvanton da eblaj kriterioj por la perfekteco de planlingvo.

La lingvo Esperanto: "La problemo de la normo en Esperanto" de Michel Duc Goninaz, "Evoluo kaj facileco de Esperanto" de François Lo Jacomo, "Psikolingvistikaj interkondiĉoj de Esperanto-evoluado" de Irēna Szanser, "Reliefigo de diakronaj faktoroj en la instruado de interlingvo" de Giorgio Silfer, "La fluideco de la lingva filtrilo" de F. Lo Jacomo, "Metodologiaj kaj terminologiaj problemoj de la lingvosciencia priskribo de Esperanto" de M. Duc Goninaz kaj "La akcento en Esperanto" kaj "Sintaksa derivado" de Ryszard Rokicki.

La instruado de Esperanto: "Esploroj en la interkampo de interlingvistiko kaj kibernetika pedagogio" de Helmar Frank. Li diskutis plurajn kriteriojn por la facileco de lingvo kaj konkludis, ke ju pli altaj estas la postuloj pri la scipova nivelo de lingvo, des pli Esperanto superas la naciajn lingvojn.



Varsovio: delonge centro de esplorado en la interlingvistiko.

La Esperanto-movado: "Esploraj postuloj pri Zamenhofa pensepoko" de Walter Zelazny kaj "Mitoj kaj realo pri avantaĝoj de Esperanto" de Sándor Révész.

Esperanto kaj la ĉirkaŭa mondo: "Ĉu eblas fondi neŭtralan interetnan lingvon per historiaj motivoj?" de Edward Symoens kaj "Internacia komunika ordo" de Tadeusz Ejsmont. Symoens klopodis pravigi Esperanton per la historio de la planlingva konstruado ekde la 17a jarcento.

Esperanto kaj komputiloj: "La nuna stato de la aŭtomata traduksistemo DLT" de Alex Olde Kalter, "Terminaro (perkomputile) kontrolita" de Ivan Bujdoso kaj "Komputado kaj evoluo de Esperanto" de Antal Münnich. Tiuj prelegantoj akcentis la sukcesojn de Esperanto sur la nova kampo de la komputilistiko kaj la servojn, kiun Esperanto povas liveri al la komputilistiko kiel ankaŭ la komputilistiko al la esperantologio.

W.A. Verloren van Themaat

Zairiano en Eŭropo

Vi eventuale ne memoras la informon el la pasintjara oktobra numero de revuo *Esperanto*, ke 19-jara studento Tufuene Mafuila ekgvidis Esperanto-kurson en Lukala, Zairio. La 2an de aprilo Mafuila venis al Eŭropo por ses-semajna studvizito.

Juna afrika studento ja ne facile vojaĝas eksterlanden, des malpli por studi la tiean Esperanto-movadon. Preskaŭ ĉiuj afrikaj esperantistoj revas vojaĝi al Eŭropo. Ĉi-jare, post multaj klopodoj, Unesko asignis vojaĝ-stipendion al zairiano, kaj oni elektis studenton Mafuila. Li poste raportos al Unesko pri siaj spertoj de la Esperanto-movado en Eŭropo.

Kvankam li studas en la ŝtata Pedagogia Universitato de Kinŝaso jam nur unu jaron, Mafuila havas ankaŭ aliajn spertojn. Li dum deviga militservo travivis kiel nura 17-jarulo tri monatojn da hororoj de la enlanda milito en Ĉado.

Esperanton Mafuila eklernis antaŭ du jaroj, kiam li aŭdis pri la lingvo de s-ro Ngangu. Poste ne nur li instruis ĝin, sed ankaŭ du liaj fratoj. Krome du liaj fratinoj parolas Esperanton.

Dum siaj du jaroj da aktivado li ankaŭ prizorgis la informan fakon de Esperanto-Instituto de Zairio. Tio ĉefe signifis aranĝi informkunvenojn. Li raportas, ke en Kinŝaso, la ĉefurbo, estas entute kvin Esperanto-kluboj kun inter 60 kaj 70 membroj. Sed en la urbo Lukala, kie aktivas lernejestro Ngangu, estas ankoraŭ pli da esperantistoj. Ili kunvenas eĉ ĉiutage. Tiaj klubkunvenoj en Zairio estas plejparte por lerni kaj

iom ekzerci la lingvon. Krome multaj zairaj esperantistoj praktikas per korespondado kun eksterlandanoj. Ke la lingva nivelo ne estas pli malalta ol en aliaj landoj, klare atestas la bela kaj flua parolo de Mafuila mem.

Mafuila esprimis sin sufiĉe kontenta pri sia unua vizito al Eŭropo. Li diversloke en Nederlando kaj Belgio prelegis pri sia hejmlando, ties vivmaniero kaj Esperanto-movado. Jam en Kinŝaso li al kutimiĝis al loĝado en granda urbo. Malpli facila por li estis la manko de sunbrilo kaj varmo. Preskaŭ ĉiu eŭropa manĝaĵo estis nova por li. En Roterdamo ja ankoraŭ estas malfacile akiri i.a. krokodilan viandon.

Mafuila spertis ankaŭ la eŭropan lingvo-problemon. El eŭropaj lingvoj li regas nur la francan. Tamen, dank' al lia lingva scipovo, UEA nun disponas pri informfolioj en la lingala kaj konga lingvoj, multe parolataj en Zairio. Li cetere nun planas kompili Esperantajn lernolibrojn en tiuj lingvoj, por kio konvenos liaj pedagogiaj studoj.

Tiuj, kiuj renkontiĝis kun Mafuila, povis konstati, ke la problemoj pri disvastigo de Esperanto en Afriko malofte kuŝas sur la kultura aŭ homa niveloj. La malfacilo kuŝas en la praktikaj, plej ofte ekonomiaj, kondiĉoj. Kial do oni interesiĝas pri Esperanto en Zairio? Mafuila respondis, ke oni esperas pri pli bona mondo. Tia idealismo estas do ĉefa nutraĵo ankaŭ de afrikaj esperantistoj, same kiel de esperantistoj en evoluantaj landoj sur aliaj kontinentoj. Krome oni ŝatas havi kontaktojn kun eksterlandanoj, precipe en evoluintaj landoj. Por tio Esperanto prezentas pli ol sufiĉe da eblecoj.

Spite la malfacilojn kreskas vere maturiĝanta Esperanto-movado en Zairio, organizata de zairianoj

Studenta entuziasmo en Ŝanhajo


La 17an de februaro aperis 600-vorta artikolo pri Esperanto, kun foto, en la ĉina anglalingva ĵurnalo *China Daily*. La artikolo, verkita de Pei Minxin, raportas la grandan intereson pri la Internacia Lingvo inter studentoj de Ŝanhaja Fremdlingva Instituto.

Laŭ la ĵurnalo, Ŝanhaja Fremdlingva Instituto en 1982 ofertis Esperanton en vespera kurso, sed kiam ĝi pasintjare – post 20-jara paŭzo – remalfermis nedevidan Esperanto-kurson por triajaraj studentoj, pli ol 130 – tio estas pli ol la duono – registris sin por ĝi. Tio surprizis la gvidantojn de la Instituto, kiu disponis pri nur tri kvalifitaj instruistoj. Du el ili antaŭ nelonge kvalifiĝis en Pekino ĉe unu el la ĉiujaraj porinstruistaj Esperanto-kursoj, gvidataj de Ĉina Esperanto-Ligo.

La enskribitaj triajaraj studentoj ricevas instruadon dum du horoj semajne. Post du jaroj oni atendas, ke ili povu legi, traduki, skribi kaj paroli la lingvon. Wei Yuanshu, kiu jam antaŭ 20 jaroj instruis Esperanton en la Instituto, komentis, ke post dujara studado la kapablo de la studentoj uzi Esperanton verŝajne superos ilian kapablon pri fremdaj naciaj lingvoj. En januaro la meza noto, rezulte de ekzameno pri Esperanto, estis B-plus.

Al la Instituto venis pluraj petoj helpi komenci kursojn en aliaj lokoj en Ŝanhajo, sed ĝis nun devis malakcepti pro manko de sufiĉaj instruistoj.

La artikolo finiĝas per raporto pri la ĉinlingva lernolibro *Gramatiko de Esperanto*, kompilita de Wei Yuanshu kaj Xu Wenqi kaj eldonita de Ŝanhaja Eldonejo por Fremdlingva Instruado en 1982. Ĝi aperis en 30 000 ekzempleroj kaj preskaŭ tuj elĉerpiĝis.



Tufuene Mafuila ekster la Libroservo de UEA, kie li kaptis la okazon studi pedagogian materialon.

mem. Mafuila petas ĉiun esperantiston, kiu venas al Zairio, nepre kontakti lokajn movadanojn. Li mem ne scias precize kiom da esperantistoj nun estas en lia lando, sed li konjektas, ke estas 140. Ili volonte akceptas donacojn de libroj aŭ gazetoj al la adreso de Esperanto-Instituto de Zairio, p/a s-ro Ngangu, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre), Zairio, de kie oni distribuos la sendaĵojn tra la lando. Kaj Fondaĵo Azio-Afriko de UEA ja restas malferma al mondonacoj por plua evoluigo de la afrika agado.

PARLAMENTA AGADO

Informado al eŭropaj parlamentanoj en Belgio

La parlamenta agado estas unu plej grava kampo por informado pri la eblecoj de la Internacia Lingvo, ĉar parlamentanoj regas nian vivon. Nia marta numero enhavis artikolon pri la solide sukcesa plugado de tiu kampo en Britio. Ankaŭ en Belgio lokaj esperantistoj laboras por influi parlamentanojn kaj parlamentajn kandidatojn. Ĉu ne estas tiel, ke la akiritaj sperto kaj sukcesoj el pluraj landoj postulas, ke ĉiu Landa Asocio okupiĝu pri informado al sia parlamentanaro? Per nia lingvo la spertoj de aliaj rekte haveblas. Kaj ju pli multe okazas tia internacia sperto-akirado, des pli profitas tiu esence nacia

agado. Tiujn laborojn kaj spertojn en Eŭropo provas kunordigi Eŭropa Esperanto-Unio (Rue Montoyer 37 B.24, B-1040 Bruselo, Belgio), kiun UEA jam tri jarojn finance subtenis.

La 14an de junio okazos ĝenerala balotado por elekti la membrojn de la Eŭropa Parlamento – la parlamento de la dek landoj de Eŭropa Ekonomia Komunumo (EEK). Prepare al tiu multnacia balotado, Eŭropa Klubo, kiu intime kunlaboras kun Eŭropa Esperanto-Unio, okazigis tiuteman kongreson en Antverpeno de la 4a ĝis la 6a de majo. La partoprenantoj venis el Belgio, Nederlando, FR Germanio, Francio, Italio kaj Greklando.

La Kongreso komenciĝis per vizito al Grafika Centro de UEA. Aparte alloga parto de la programo estis prelego de inĝ. A.P.M. Witkam pri la evoluo de la permaŝina traduksistemo Distribuita Lingvo-Tradukado, kiu utiligas Esperanton kiel pontlingvon (vd. *Esperanto*, jan. 1984). La direktoro de Instituto por Tradukistoj kaj Interpretistoj de Nacia Universitata Centro Antverpeno (HIVT-RUCA), d-ro D. Godfrind, poste deklaris, ke la prezentitaj faktoj estas nekontestebla pruvo pri la valoro de Esperanto, kaj ĉiuj liaj studentoj devus konscii pri tio. Vespere, Angelos Tsirimokos, tradukisto ĉe EEK, prelegis pri la realo de sia profesia laboro.

La 5an de majo Flandra Sekcio de Eŭropa Klubo organizis renkontiĝon kun kandidatoj por la Eŭropa Parlamento. Oni informis ĉiujn kandidatojn per oklingva, presita invitilo. La diskutadon prezidis d-ro Yvo Peeters, bone konata persono en eŭropaj medioj. Eŭropa parlamentano Jaak Vandemeulebrouke (VU, flandra konservativa partio) defendis la rajton de la popoloj je la propra lingvo kaj li vidis en la interpopolaj rilatoj specialan perspektivon por Esperanto. Li proponis, ke la frakcioj (aroj de samtendencaj partioj el la diversaj landoj) eldonu siajn informilojn ankaŭ en Esperanto. Ankaŭ aliaj kandidatoj konsentis fari tian proponon al sia frakcio. Ili estas Dirk Janssens, sekretario de la ligo de "verdaĵ", t.e. ekologiaj, partioj, Dirk Drijbooms, rekta kunlaboranto de eŭropa parlamentano Karel Van Miert, kiu estas la prezidanto de Flandra Socialisma Partio, kaj Rika De Backer, iama ministrino pri nederlanda kulturo kaj kandidato de la Kristana Partio.

Oni krome traktis la pretervidon fare de EEK de propono de Ernest Glinne, prezidanto de la socialisma frakcio en la Eŭropa Parlamento. La propono temas pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn. La sekretario de s-ro Glinne, s-ino Van Hamme, kiu anstataŭis lin en la Kongreso, konfirmis, ke li refaros sian proponon en la nova mandatperiodo, kaj antaŭ tio li larĝe konsultos Eŭropan Klubon kaj Eŭropan Esperanto-Union. Ankaŭ ekologiaj partioj montris pretecon subteni iniciatojn favore al Esperanto.

Pli pri "Usono"

Kun granda intereso mi legis la artikolon de Bernard Golden pri la origino de la vorto "Usono" en la januara n-ro de *Esperanto*. Tiun vorton verŝajne ne inventis ni esperantistoj, sed la usonanoj mem. En la jaroj 1905-06 ekestis en Usono esprimmaniero, kiu tamen rapide elmodiĝis, laŭ kiu la loĝantoj ne plu nomu sin "Americans", sed "Usonans", por distingi inter la anoj de ĉiuj aliaj ŝtatoj en Norda, Meza aŭ Suda Ameriko kaj tiuj de "United States of North America" (kies oficiala nomo tamen estas "United States of America").

Sendube la tiamaj usonaj esperantistoj simple prunteprenis la novan esprimon, kiu ja estas pli logika kaj pli respektama al aliaj amerikaj ŝtatanoj ol "amerikano". Mi legis tiun informon antaŭ kelkaj jaroj en *International Herald Tribune*, kiu ĉiutage aperigas mallongan rubrikon pri interesaj eventoj, kiuj okazis antaŭ 75 kaj antaŭ 50 jaroj. Mi siatempe eltondis kaj konservis la informon, kaj, kiam (aŭ se) mi retrovos ĝin en mia arkivo, mi sendos ĝin al s-ro Golden kaj al la redaktoro.

Eskil Svane, Aŭstrio

La artikolo de Bernard Golden pri la historio de la vorto "Usono" estis tre informa, sed ĝi evidente baziĝis sur la erara supozo, ke tiu vorto estas originalaĵo en Esperanto. Fakte, ĝi estas prunteprenaĵo el la angla lingvo.

La originala elpensinto estis ne usonano, sed la angla verkisto Samuel Butler (1835-1902). En la nuna jarcento, la adjektivo *usonian* estas ligita precipe al la mondfama arkitekto Frank Lloyd Wright (1869-1959). Por li, tiu vorto reprezentis gravan kaj fundamentan elementon de lia profesia filozofio. Estas tre verŝajne, ke lia ofta kaj entuziasma uzado de la vorto estis kialo de ĝia apero en nia lingvo.

Thomas A. Goldman, Usono

Abomeninda eŭropismo

Pri la nomoj de landoj Zamenhof skribis: "De la komenco ĝis nun mi ĉiam uzadis la nomon 'Egipto' ne por la lando, sed por la *popolo*; la landon mi nomadis 'Egiptujo'. Mi tion faradis ne pro nesufiĉa pripenso, sed tute pripensite kaj intence." En la malnovaj landoj "ĉiun pecon da tero okupis ia speciala gento, nomis la landon sia speciala genta propraĵo...; tial la landoj malnovaj preskaŭ ĉiam portas la nomon de tiu aŭ alia

gento, kaj en Esperanto,... ni tion esprimas per la sufikso 'uj'." (*Lingvaj respondoj*, p.14.)

La vorto *Koreo* estas uzata kiel landnomo en eŭropaj lingvoj same kiel en la ĉina, japana kaj korea. Sed la principon de la nomado por malnovaj gentoj/landoj, sintezitan de la Majstro, konsekvence akceptis preskaŭ ĉiuj japanaj, ĉinaj kaj koreaj esperantistoj, dekomence uzante la radikovorton *koreo* kiel gentnomon, indifere al la sistemo de landnomado en siaj naciaj lingvoj.

La asertoj de ĉefe eŭropaj esperantistoj, kiuj potencadas en Esperantujo pro siaj privilegioj, devenantaj de la lingvoj prehistoriaj de la nova lingvo



Ankaŭ en Seulo esperantistoj postulas kundecidrajton en la evoluo de la lingvo.

Esperanto, ne konvinkas koreojn. La gento korea kun sia lando estas unu el la plej malnovaj. Tiuj, kiuj asertas, ke *Koreo* estas landnomo, pretendas, ke ĝi havas tradicion en Esperanto. Tiu tradicio estas transprenita de eŭropaj esperantistoj el eŭropaj lingvoj en la novan lingvon, naskitan en nova tradicio. Koreoj abomenas tian diskriminacion, malfidelan al la principo de Zamenhof kaj al la nova Esperanta tradicio.

La eŭropaj esperantistoj ne citas el la vortaroj kaj dokumentoj de koreaj esperantistoj mem. La malĝustan kaj rutinan aserton de la t.n. tradicio prehistoria en Esperanto la orientanoj nomas "eŭropismo" aŭ "eŭropcentrismo".

La konsilo de Zamenhof ankoraŭ validas, do ke la malnovaj gentnomo kaj landnomo estas *koreo/Koreujo* estas juste kaj ĝuste; kaj la nekonfuzeco estas la privilegio de Esperanto. Facilecon en Esperanto por ĉiuj, por ĉiam!

Ke la gentnomo kaj la landnomo de la korea nacio estu *koreo/Koreujo* en Esperanto, unuanime decidis la direktoraro de Korea Esperanto-Asocio en marto 1982.

Ahn Songsan, Korea Respubliko

Argumentado pri Esperanto en brita televida teatraĵo

Dimanĉon la 27an de majo la brita televida kanalo BBC2 elsendis je 19h15 sepdek-minutan teatraĵon, en kiu Esperanto estis centra en la temo. La teatraĵo titoliĝis "High Hopes" (Altaj esperoj), verkita de Jill Hyem. En ĝi rolis pluraj vaste konataj britaj geaktoj: Virginia McKenna, Dandy Nichols, Lesley Manville, Philip Joseph kaj la japana aktoro Eigja Kusu-hara.

Lastatempe oni pli kaj pli ofte menciis Esperanton en britaj programoj – ofte kvizoj. Krome britaj elsendejoj de tempo al tempo petis informojn de Esperanto-organizaĵoj. Sed la grava teatraĵo ŝuldas sian ekeston al baza enkonduka leciono, eldonita de Esperanto-Asocio de Britio, per kiu la verkinto unue konatiĝis kun la Internacia Lingvo.

En la teatraĵo, kiu evoluis okaze de pensita kursa renkontiĝo de kelkaj esperantistoj kaj lernantoj, leviĝis diversaj argumentoj por kaj kontraŭ internacia lingvo. Multaj britaj esperantistoj, inkluzive de Brian Barker, organizanto de la sukcesa parlamenta premgrupo por Esperanto, opinias la teatraĵon bonega informado.

Krome, invitita de la 68a Brita Esperanto-Kongreso (de la 25a ĝis la 28a de majo en Weston-super-Mare), la populara demandprogramo de la brita radio-kanalo 4 "Any Questions?" (Ĉu iuj demandoj?) registriĝis antaŭ la kongresanaro.

INSTITUCIO HODLER

Nur du subvencioj

En sia kunsido, la 6an de majo en Antverpeno, la estraro de Institucio Hodler '68 decidis asigni nur du subvenciojn. La unua, de 1 500 guldenoj, estas asignita al Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj, por helpi al homoj kun transpagaj malfacilaĵoj partopreni en la 52a Kongreso de Blindaj Esperantistoj, ĉi-jare en Italio. La duan subvencion ricevis Flandra Esperanto-Ligo (Belgio), kiel apogon al la planoj eldoni manlibron por la aktivuloj de la Esperanto-movado. Tiu subvencio altas 800 guldenojn.

Fakte, la estraro de la Institucio havis iom pli da mono por ĉi tiu celo, sed ĝi konstatis, ke ne venis adekvataj subvencipetoj. Tio ne signifas, ke subvencipetoj mankis, sed ke la estraro juĝis ilin ne havi tutmovadan gravecon, tiel ke ili meritu subtenon de la Institucio, kiu ja havas aliajn problemojn.

Tiuj aliaj zorgoj de Institucio Hodler '68 fontas el la fakto, ke la domo en Antverpeno, kiu nun donas tegmenton al pluraj instancoj kaj organizaĵoj (Grafika Centro de UEA, Flandra Esperanto-Ligo, Esperanto-Societo "La Verda Stelo"), siatempe estis aĉetita grandparte dank' al senrenta prunto de UEA. Nun tiu ŝuldo de la Institucio sumiĝas je ĉ. 140 000 guldenoj. Pro la prokrasto de la planoj vendi la loĝdomon en Roterdamo (kiu devus repagi la plimulton de la ŝuldo), la estraro decidis komenci la likvidadon de tiu prunto anstataŭ disdoni pli da subvencioj. UEA kompreneble bonvenigas tian decidon, eĉ se ĝi signifas, ke ĉi-foje kelkaj fondaĵoj de la Asocio (Fondaĵo

Nova statuto de GEA

Kadre de sia 62a Kongreso, kiu okazis en Kassel de la 6a ĝis la 8a de aprilo kun pli ol 150 partoprenantoj, Germana Esperanto-Asocio (GEA) akceptis novan statuton. Ĝin preparis la pasintjare elektita juna estraro. La esenca novaĵo en la statuto estas reformo de membreco.

Estas konate, ke eksteruloj ofte demandas pri la nombro de membroj de landa asocio, por konkludi el tio, kiom da esperantistoj ekzistas. Pro la displitiĝo de la esperantistoj en FR Germanio, GEA povis ĝis nun kolekti nur malgrandan parton de ili kiel ordinarajn pagantajn membrojn. La nova statuto difinas la tiel nomatajn subtenantajn membrojn, kiuj eble ne regule pagas kotizon, sed apogas la celojn de la Asocio per donaco, ia helpo aŭ skriba deklaro. Tio ebligas al GEA membrigi ĉiajn subtenantojn. Membroj de Esperanto-organizaĵoj, kiuj aliĝas al GEA kiel suborganizaĵo, estas aŭtomate aligitaj membroj. La reprezentantoj de tiuj suborganizaĵoj formas kun la estraro la konsilion de GEA kaj tiel influas ties laboron. Membroj, kiuj ne plu pagas kotizon, restas subtenantoj per tio, ke ili ne forfalas el la membraro ĝis skriba eksigo.

Per tiu ampleksa difino de membreco Germana Esperanto-Asocio celas roli kiel tegmenta organizaĵo por ĉiuj Esperanto-parolantoj kaj simpatiantoj, donante al la ekstera publiko pli trafan bildon pri la intereso kaj apliko de la Internacia Lingvo en FR Germanio.

Azio-Afriko, Fondaĵo Canuto) ne ĝuos la subtenon de la Institucio, kaj UEA mem devas trovi la rimedojn, necesajn por ke la agado sur tiuj kampoj ne stagnu.

El ĉio ĉi vi povas konkludi, ke la Institucio, kiu tra la pasintaj jardeko kaj duono elkreskis en la plej grandan movadan mecenaton, bonvenigus pli da subteno de la esperantistaro. Se vi volas scii pli da detaloj pri Institucio Hodler '68, ne hezitu skribi, ĉu al la adreso de la CO de UEA, ĉu al tiu de la prezidanto de la Institucio: d-ro Renato Corsetti, Via Collazia 21/1, I-00183 Roma, Italio.

KONGRESOJ

Jubilea kongreso de fervojistoj

La inaŭguro de la 36a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF) ĉe nigramara Suna Bordo en Bulgario je la 13a de majo postlasis vere imponan impreson: 860 fervojistojn el 23 landoj persone bonvenigis la Alta Protektanto de la kongreso, trafikministro Vasil Canov. Ankaŭ la ĝeneral-direktoro de la Bulgaraj Ŝtatfervojoj (BDŽ) kaj vic-ministro por trafiko Stoil Ferdov mem ĉeestis, krom pluraj aliaj eminentuloj kaj reprezentantoj de sindikatoj, de la urbo Nesebar kaj de diversaj sociaj instancoj. UEA estis reprezentita de István Gulyás el Budapeŝto.

Pri tri fervojfakaj agadoj mi raportu ĉi tie: prelego kaj filmo pri BDŽ, fervojaj aktualaĵoj el diversaj landoj kaj laboro de la Terminara Komisiono. La ĉefredaktoro de la fervoja revuo *Železopâten transport*, inĝ. Rod Sinigerov, verkis la aktualan superrigardon pri nuna stato kaj perspektivo por disvolvo de la fervoja transporto en Bulgario, dum Georgi Dolapĉiev esperantigis kaj prezentis ĝin. Kvankam la enhavo estis pro la temo tre ĝenerala, tiu prelego (kiu aperis kiel presita broŝuro) aparte altvaloras pro la fakto, ke tiaj informoj pri Bulgario malabundas en fervojaj arkivoj – almenaŭ en okcidentaj landoj. La sekvinta filmo (profesia sonfilmo 24mm) prezentis en koloraj bildoj multajn el la antaŭe priskribitaj faktoj. La tradukitan komenton prezentis per sonbendo la konata aktorino Belka Beleva; domaĝe ke pro teknikaj malfacilaĵoj la aŭdebleco iom suferis.

Fervojajn aktualaĵojn poste prezentis 11 kolegoj el tiom da landoj. El Belgio Lucien de Sutter informis pri la enkonduko de nova horarsistemo kun fiksaĵoj intervaloj, pri ekuzo de duetaĝaj pasaĝervagonoj kaj pri senpaga lingvo-instruado en veturantaj trajnoj, por ke la vojaĝantoj ne enuu. Frank Curtis el Britio prezentis novan modernan urban fervojon por la dis-

trikto Tyne kaj Wear, kun impresaj lumbildoj. Kompreneble ankaŭ Bulgario kontribuis al la programero. Georgi Dolapĉiev klarigis detalojn pri la pramŝipa ligo inter Varna kaj Iliĉovsk en Soveta Unio. Kvar grandkapacitaj pramŝipoj, kies portipovo estas po 108 varvagonoj por larĝa ŝpuro, transportas vagonojn el Soveta Unio, kiuj en Varna trapasas ŝpurŝanĝejon kaj poste plurulas sur normalŝpuraj trakoj. Pri fervoja esplorinstituto en Ĉeĥoslovakio kun cirkla provtrako raportis inĝ. Petro Chrdle. Sekvis Finnlando, kie oni laŭ mag. Nils Gösta Narvala, ĵus konstruis novan fervojlinion al profundakva haveno apud Pori en la Golfo de Botnio. El Germana DR oni eksciis de Heinz Hoffmann detalojn pri lingvokomprena eksperimento en fervoja trafiko. Al neesperantistaj studentoj oni aŭdigis laŭtparolilajn anoncojn en nia lingvo: pri enveturo de trajno, pro malfruigo de trajno, kaj pri kajoŝanĝo de trajno. Poste oni esploris, kiom el ili kion komprenis. Por Hispanio Rafael Ruiz prezentis bilde la trajnon Pendol-Talgo, kies vagonkesto kliniĝas en kurbiĝoj por ebligi komfortan vojaĝon ĉe relative altaj rapidecoj, malgraŭ negrandaj kurboradiusoj. János Patay el Hungario montris lumbildojn pri la 100-jara jubileo de la fervojo Szombathely-Köszeg. Per Engen el Norvegio informis pri enkonduko de elektronika eksped-aparato, kiu eldonas ĉiuspecajn biletojn kaj frajtpaperojn por pecajoj, ekspresaĵoj kaj tutaj vagonoj, samtempe certigante la kalkuladon kaj registradon de la enspezoj. Novan luksan trajnon el Svedio prezentis Evert Rausek. Per ĝi oni volas konkurenci kun aer-trafiko per komforto kaj la ebleco utiligi la vojaĝtempon por konferencoj aŭ skribaj laboroj. La lasta kontribuo venis el Svislando de Otto Walder. Oni konstruis sur la linio de Gotthard unikan montaran ponton, kiu samtempe estas betona tuneltubo por protekti la fervojon kontraŭ lavangoj. Laŭ opinio de multaj, tiu ĉi progra-



IFEFF festas la 75-jaran jubileon de la fervojista movado.

mero pri aktualaĵoj pli kaj pli valoriĝas pro sia varia kaj aŭtentika komunikado.

Kompare al tio la Terminara Komisiono laboras silente inter si, sed ne malpli grave. La progreso en la laboroj pri Esperanta aldonado al fervojfaka seslingva leksikono de Internacia Unuiĝo de Fervojoj (UIC), aperonta 1985 aŭ 1986, kontentige progresas.

Unu el la kongresaj kulminoj fariĝis la publika plenkunsido, en kies kadro IFEF – aŭ pli precize la fervojista movado – festis sian 75-jaran jubileon. IFEF-prezidanto Joachim Giessner povis fiera prezenti la ĵus pretiĝintan broŝuron *Historio 1909-1984*, rezulto de naŭjara komisiona laboro. Sur 80 paĝoj troviĝas jam preskaŭ forgesitaj detaloj pri la internaciaj unuiĝoj de esperantistaj fervojistoj de la komenco ĝis hodiaŭ, pri la faka laboro, pri Esperanto en fervojaj horaroj, pri la landaj asocioj de IFEF en Aŭstrio, Belgio, Britio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Japanio, Jugoslavio, Nederlando,

Norvegio, Pollando, Svedio kaj Svislando. Pli ol 60 bildoj konservas valorajn dokumentojn kaj la memoron pri meritplenaj homoj.

Ne estas tie ĉi la loko por priskribi la tutsemajnan programon organizitan en Slančev Brjag. Telegramstila resumo menciujenon: du gazetaraj konferencoj, du ekspozicioj, senpaga fervojbileto tra Bulgario, speciala poŝtstampo, akcepto por ĉiuj kongresanoj de la Alta Protektanto, kun abunda malvarma bufedo, parado de uniformportantoj, lingva instruado ĉiutaga, kunsidoj de komisionoj kaj de la Komitato, kiu reelektis la estraron (por du jaroj) kaj konfirmis la kotizon, prezentado de teatraĵo, de moderna dancarto kaj de klasikaj muzikaĵoj, de folkloraĵoj, balo, film-projekciado, du tuttagaj ekskursoj dum la kongreso kaj du postkongresaj ekskursoj kaj plantado de "Arbo de amikeco". La Gazetara Servo aperigis kvar bultenojn, kaj okazis dokumenta filmado pri la tuta kongreso. Venontjare IFEF kongresos en Skandinavio: en Vejle, Danlando.

G. Ritterspach



69a

UNIVERSALA KONGRESO

DE ESPERANTO, Vankuvero (Kanado)

21-28 julio 1984

**Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando.**

**Adreso de LKK: 53 North Boundary,
Vancouver, B.C., Kanado V5K 3S4.**

Alta Protektanto: Pro malsano de la nomita vicreĝo de Kanado kaj la sekva necerteco pri tio, kiu okupos tiun plej altan oficon en la kongreslando, oni prokrastis la decidon, ĉu la vicreĝo akceptas fariĝi la alta protektanto. Nun evidentiĝis, ke la problemo ankoraŭ ne estas solvebla, kaj tial la provincestro de Brita Kolumbio, s-ro Robert G. Rogers, akceptis la oficon de Alta Protektanto de la 69a UK. La vicreĝo de Kanado estas la oficiala reprezentanto de la reĝino de Britio; la provincestroj simile estas ŝiaj reprezentantoj en la diversaj provincoj de la lando. Ilia funkcio estas nepolitika.

Malaltekostaj loĝeblecoj: LKK sukcesis akiri kvanton da litoj en junulgastejo en la urbo Vankuvero. Kvankam oni devos veturi duonhoron por atingi la kongresejon, la kosto estas nur po 22 gld. nokte. Tiuj, kiuj ankoraŭ ne mendis sian loĝejon kaj volas profiti de la oferto, rajtas uzi la kutiman mendilon: ili kalkulu laŭ la supra prezo kaj surskribu "Junu-

Kongresa Komunikado

largastejo". *Atentu!* La oferto validas nur dum la kongresa semajno. LKK asignos la litojn prioritate al junuloj kaj kongresanoj el landoj kun transpagaj malfacilaĵoj, se la kvanto ne sufiĉos por ĉiuj.

Klerigaj programeroj: La renoma fonetikisto kaj lingvisto d-ro John Wells de la Universitato de Londono prezentos serion de kvar prelegoj dum la UK: "Lingve tra la mondo". Enkadrigita en la 7a Esperantologia Konferenco, la serio traktos la minoritatajn lingvojn de Norda Ameriko, Eŭropo, Afriko kaj Aŭstralio, kaj tiel komplementos la Kongresan Temon "Lingvaj minoritatoj: ĉu nur nacia fenomeno?", kiun gvidos d-ro Jonathan Pool de la Universitato de Vaŝingtono.

Jonathan Pool krome prelegos en la kadro de Internacia Kongresa Universitato, en kiu prelegos ankaŭ Ĉen Yuan (Ĉinio) pri la ĉina lingvo, Juan Régulo Pérez (Hispanio) pri la eldonejo Stafeto, Helmar Frank (FR Germanio) pri la lernfacileco de vortoj, Daniela Deneva (Bulgario) pri tertremoj kaj Bruce Arne Sherwood (Usono) pri komputiloj, kiuj parolas Esperanton. D-ro Pool prelegos pri "Lingviko, Politikiko kaj Ekblek". Se vi ne komprenas tiun titolon... venu al Vankuvero!

Ĉirkaŭkongresaj eventoj: La Oficiala Antaŭkongreso en Montrealo bone progresas; ĝis la komenco de majo aliĝis 49 partoprenantoj.

Same montriĝis multe da interesiĝo pri Postkongresa Ekskurso 1 en Brita Kolumbio. Tiu ekskurso inkluzivas ŝipvojaĝon laŭlonge de la okcidenta marbordo de Brita Kolumbio kaj malgraŭ prezaltiĝo (ĝia

nuna kosto estas \$Kan 470 aŭ 1 080 gld., sed la unu-persona suplemento estas nun nur 130 aŭ 300 gld.). Preskaŭ ĉiuj mendoj elektas ĉi tiun ekskurson kaj ne Postkongresan Ekskurson 2, kiu plej verŝajne forfalos.

Kial nacilingvaj paroladoj?

En 1977 Universala Esperanto-Asocio invitis du specialajn gastojn partopreni la Universalan Kongreson en Rejkjaviko. Unu estis s-ro Leonard Sussman, usona specialisto pri komunikaj rajtoj kaj lastatempe delegito de Usono ĉe la Ĝenerala Konferenco de Unesko. La dua estis s-ro Amadou-Mahtar M'Bow, kiu alparolis la Kongreson en la Solena Inaŭguro en la franca lingvo. Esperanta traduko de lia parolado estis distribuita al la ĉeestantoj en skriba formo tuj antaŭ la parolado, tiel ke ili povu sekvi la paroladon.

Kompreneble s-roj M'Bow kaj Sussman ne estis la unuaj, kiuj alparolis Universalan Kongreson en nacia lingvo. Jam de jaroj tio okazas – kio estas tute komprenebla en solena aranĝo eksteren direktita. Ofte, tamen, oni liveras sinsekvajn interpretadon por tiuj paroladoj, kaj tio evidente malrapidigas la antaŭeniron de la programo.

La praktikon distribui *skriban* tradukon de la ĉefparolado en la Inaŭguro oni sekvis denove en 1979, kiam la nuna Asista Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, s-ro Robert Muller, alparolis la Universalan Kongreson en Lucerno en la franca. Oni aplikis la saman sistemon en 1982 en Antverpeno por ambasadoro Mustafa Masmoudi, el Tunizio, kaj por s-ro Richard Butler, Ĝenerala Sekretario de Internacia Telekomunika Unio, kiu alparolis angle la Universalan Kongreson en Budapeŝto.

Bedaŭrinde en Antverpeno kaj Budapeŝto la distribuado de tekstoj ne tute glate funkciis, tiel ke multaj homoj ne havis antaŭ si la Esperantan version de la vortoj de la parolantoj.

La principo inviti gravan ekstermovadan funkciulon alparoli nian kongreson havas plurajn tre pozitivajn flankojn. Unue, ĝi donas al la kongresanoj okazon ekkoni la opiniojn kaj ideojn de homoj influaj sur laborterenoj najbaraj al la nia. Temas do pri *eduka* valoro. Due, ĝi liveras al ni kialon inviti tiujn homojn vidi niajn kongresojn de proksime kaj tiel konatiĝi kun la pretendoj kaj atingoj de Esperanto. Sekve la vizitoj havas *informan* valoron. Trie – kaj egale grave – tia praktiko gajnas por ni novajn amikojn en influaj pozicioj, homojn, kiuj simpatias kun niaj celoj kaj komprenas nian agadon. Kun neniuj el la ĉi-supre

Statistiko: Ĝis la fino de majo aliĝis 673 kongresanoj. La ĉefa lando restas Usono, kiu kontribuos pli ol kvaronon de la kongresanaro. Rangas poste Kanado, Francio, Britio, FR Germanio, Nederlando, Japanio, Svedio, Belgio kaj Aŭstralio.

menciitaj homoj ĉesis post la UK la kontaktoj: ili ĉiuj hodiaŭ troviĝas inter tiuj, kun kiuj ni pli-malpli regule kontaktiĝas pri la agado de la Asocio.

Ekzistas tiuj, kiuj asertas, ke tiu utiligo de nacia lingvo en niaj kongresaj inaŭguroj estas nova. Ĝi ja ne estas. Aliflanke, gravas, ke la organizantoj de la kongreso liveru al la kongresanoj ĝustatempe la bezonatan Esperantan tradukon. Se tio ne okazas, la rezulto ne estas eduko, sed nur enuo.

Humphrey Tonkin

Eduka Fondaĵo Carson

En *Alumeto*, informbulteno de Kanada Esperanto-Asocio, n-ro de aprilo 1984, ni legis pri nova granda mondonaco al la Movado de la lando, kiu ĉi-jare gastigas la 69an Universalan Kongreson de Esperanto. Temas verŝajne pri rekorda donaco de 70 000 kanadaj dolaroj (ĉ. 163 000 guldenoj), veninta de s-ro Chuck Carson, malnova membro de KEA kaj de UEA. S-ro Carson jam pli frue faris grandajn donacojn al la kanada Esperanto-movado: en 1979 li kontribuis per 50 000 kanadaj dolaroj, kaj poste disponigis pliajn sumojn por subteni eldonprojekton de R. Eichholz, informkampanjon kaj prelegvojaĝon renkonte al la ĉi-jara UK.

Laŭ *Alumeto*, la nova donaco fariĝos la bazo de "La Eduka Fondaĵo Carson", el kiu oni subvencios: komputilajn programojn, vojaĝ- kaj stud-programojn, novajn lernolibrojn, korespondajn kursojn, lerneajn kaj universitatajn Esperanto-kursojn, instruadon de Esperanto pere de radio kaj televido. Almenaŭ en la komenco, la Fondaĵo ne planas distribui subvenciojn en sumo pli granda ol 12 000 kanadaj dolaroj jare. Ŝajnas, ke unu el la respondeculoj pri la nova Fondaĵo estas s-ro Wally du Temple, prezidanto de LKK de la 69a UK en Vankuvero.

S-ro Carson ne estas riĉa kanada industriisto aŭ simile, sed simpla ŝparema homo, kiu amas la ideojn ligitajn al la Internacia Lingvo kaj pretas subteni ilian realigon laŭ ĉiuj siaj povoj. Tia rilato al Esperanto estas la ŝlosilo de tiu malnova demando, kiel la zamenhofa lingvo sukcesis travivi preskaŭ plenan jarcenton sen ajna ŝtata aŭ alia simila subteno. Ekzisto de tiaj mecenatoj kia s-ro Carson estas ankaŭ unu el la plej belaj kuraĝigoj por daŭrigi la laboron por la progreso de la Internacia Lingvo.

Por kompreni la estontecon

Sferoj-2; Sciencfikcio kaj fantasto, div. aŭtoroj. Div. tradukintoj. Komp. M. Gutierrez Aduriz. Santander: la kompilinto, 1983. 145p. Ilus. 19cm. ISBN 84 300 9632 9. Prezo: 18,00 gld.

En 1982, Grupo NIFO eldonis *Sferoj-1*. Ĝi estas provo aperigi vere profesinivelan eldonaĵon por "riĉigi la esperantan kulturon rilate la sf-fakon". La merkato ŝajne ne sufiĉe maturas por nutri tian periodaĵon, do NIFO intencas eldoni ĉi tian libron unufoje jare.

La unua volumeto estis iom sukcesa: ĝi prezentis novelaron de diversnaciaj aŭtoroj, ekz. Arthur C. Clarke, tradukita de William Auld, kaj Stanislaw Lem, tradukita de Zbigniew Sienkiewicz.

La dua volumo estas pli bona je la dua potenco. (Mi ekaŭdis, ke jam aperis la tria volumo – kia do ĝi devas esti!) Ĉi tie ni trovas la klasikan "La biblioteko de Babelo" de Jorge Luís Borges (trad. G. Cappa), en kiu oni klarigas al ni la strangan formon de la universo; "La renkontiĝo" de Jaroslav Veis (trad. A. Staňura), en kiu nia pozicio en la kosmo montriĝas tre relativa; "Signalo por pluvivi" de Herbert W. Franke (trad. E. Bick): tipa ekzemplo de "pura" sciencfikcio, ĉe kiu la "intrigo" estas teknologia solvendaĵo; "La urbo, kies nomo estis Kadavro-pluva" de Enrique Lazaro (trad. F. de Diego): tute superrealisma novelo, en kiu oni serĉas sur diversaj niveloj de realeco – kaj finfine tute perdiĝas en ili; la bonegan "Rendevuo" de fratoj Strugackij (trad. A. Ananjin kaj J. Reutov): vojaĝante tra kosmo, de planedo al planedo, ĉu ni certe kapablos distingi inteligentan esta-

ĵon disde besto? – kaj plurajn aliajn novelojn el Ĉinio, Hungario, Usono ktp.

Grupo NIFO malpretendas eldoni antologiojn, tamen ĝi donacas al Esperanto variajn ekzemplojn de hodiaŭa "sciencfikcio kaj fantasto" tra la mondo. Tiu ĉi ĝenro daŭre plipopulariĝas, ĉar ĝi bone spegulas nian bezonon kompreni nin mem, nian socion kaj ĝian kienon, ĝian ontecon – ĉu ne ke hodiaŭ estas la unua tago de la estonteco? Por tiuj el ni kiuj naskiĝis en la lastaj kvardek jaroj, kaj kiuj ĝisvivos la dudekunuan jarcenton, tiu onta mondo estos kvazaŭ fremda planedo. Ni devos prepari nin por ĝi, lerni ĝian lingvon (Esperanto, ĉu ne?), kaj alproprigi ĝian spiriton. Tion oni ne povas fari legante nur detektivaĵojn.


Richard Cash (Francio)

Unika balado

Trombonoj de Jeriko, La/Die Posaunen von Jeriko, Richard Schulz (1906). Paderborn: Esperanto-Centro, 1984. 65p. Ilus. de Ernst Schomer. 21cm. Dulingva: Esperanta-germana. Muziko de Felicitas Kukuck. ISBN 3 922570 37 2. Prezo: 15,90 gld.

Petite de sia amiko Felicitas Kukuck verki baladon, kantotan akompane al polonezoj laŭkutime dancataj en la kastelo Rothenfels (Bavarujo), la aŭtoro elektis enbaladigi la unuajn ses ĉapitrojn de la Libro de Josuo: brila ideo brile efektivigita. La historio de la tuta biblia Libro konsistigas la ŝtofon, de epopeo, verkita ĉirkaŭ 400 a.K. de la kvar aŭtoroj de la Pentateŭko (kiu tial devus esti nomata Heksa-teŭko). Por la metro li elektis, ne la heksametron (bonŝanĉe) de la bela germanlingva *Messias* de Klopstock (1750), sed la kvartrokeon, kiun uzis Pampur en *La bapto de caro Vladimir*, kun rimo (abcb) tamen, kaj Kalocsay en *Ezopa saĝo*, n-ro 31, ankaŭ kun rimo (sed abab). La ritmo de ĉi tiuj kvartrokeoj estas tiel bone markita, ke oni ne rimarkas la senrimecon. La rakonto fluas antaŭen kun nehaltigebla vervo; kaj ne mirigas ekscii, ke la kantado, akompanata de gitaro, bone sukcesis.

La malpeza tono propra al balado neniel minas la religiecon de la historio. Tion ja garantias la fakto, ke la germana versio, kiu flankas la Esperantan, sekvas proksime la tekston de Lutero, kvazaŭ tiu mem skribus trokee; ekzemple paĝo 7/verso 6, 12 kaj 14, 9/3, 11/5, 12/3, 23/11, 38/6 kaj 8, 43/7, 47/3 kaj 6. La Zamenhofan tekston la Esperanta versio ne tiel fidele eĥas, kaj foje ĝi ne ekzakte spegulas la germanan (ekz. p.19/14-16, 57/4). La ŝerca tono montras sin ĉe p.9/5, kie la vorto "dufoje" indikas, ke en la Biblio Dio ripetas sin; plue, la mallongigo *usw.* ĉe paĝo 30/verso 12, kaj tie, kie (p.12/4) anstataŭ nomi Raĥeb "malĉastulino" laŭ Zamenhof kaj si mem ĉe p.55/6, li skribas "Tiu estis... nu, vi scias". Ial li nomas ŝin



"Raĥabino", verŝajne pro la trokeo; sed la lingvaĵo estas senriproĉa: aŭdaca eble "trans-Jordanis" (p. 39/12), aŭdaca certe „vin donotan" (p. 6/4), kvankam tute klara.

Nenio estas ellasita, kaj la laŭokaza kunpreno de du aŭ eĉ pli da versoj en unu strofon estas tre lerte farita. Fine, la 125 versoj de la Biblio estas redonitaj en 74 strofoj. La dek kvar vinjetoj de Ernst Schomer malkaŝe substrekas la ŝercan flankon; sed ĉu necesis fari Raĥabon tiel malmulte alloga? Eble jes. Flavpaĝa enmetaĵo klarigas la genezon de la verko kaj enhavas la melodiojn de la ses "lidoj" komponitaj de Felicitas Kukuck. Finas la ankaŭ teknike laŭdindan libron tri biografietoj.

Jen la Esperanta literaturo pliriĉiĝis per alia unikaĵo.

D.B. Gregor (Britio)

Averto pri nuklea milito

Sur la bordo (1957), Nevil Shute (N.S. Norway, 1899-1960). El la angla trad. K.G. Linton (1906). Sidnejo: Aŭstralia Esperanto-Asocio, 1983. 254p. 21cm. ISBN 0 9595336 3 X. Prezo: 27,00 gld.

Malgraŭ la maltrafo de la fantazia konjekto pri la nuklea mondmilito, kiu, laŭ la aŭtoro, devus okazi en la sesdekaj jaroj, la romano restas instrua, kun reala signifo kaj universala kvalito. Ĝi avertas nin, ke tia milito, se okazus, estus la fina konflikto, ĉar la atombomboj en la arsenaloj de la mondo jam superas la nombron, kiu sufiĉus por detrui ĉian vivon sur nia planedo.

La rakonto, kun simpla kaj interesa intrigo, ensceniĝas en Melburno, urbo en suda Aŭstralio. Per lertaj kaj detalaj priskriboj la aŭtoro kondukas la legantojn de la krozanta usona submarŝipo Scorpion al la ŝipejo de Melburno, la strando ĉe Falmouth, la farmbieno ĉe Harkaway ktp., kie honestaj loĝantoj, ĉu paŝtistoj, ĉu dommastrinoj, ĉu oficiroj, montras fortan amon al la vivo, laboro kaj paco, malgraŭ la minaco de la mortiga radioaktiveco, kiu, rezulte de la imagata nuklea milito, jam englutis la nordan hemisferon kaj nerezisteble moviĝas suden en ĉiu minuto. Tiu akra kontrasto facile inspiras al la legantoj fortan abomenon kontraŭ la atombomba milito.

La romano, bedaŭrinde, aludas atakon fare de Ĉinio per raketoj. Estas konate, ke Ĉinio jam ripete deklaris, ke en ĉiu ajn situacio Ĉinio neniam la unua uzos nukleajn armilojn. Mi insistas pri tio ne nur pro patriotismo, sed pro la kredo, ke se ĉiuj landoj, kiuj posedas nukleajn armilojn, donus la saman garantion, oni povus efike eviti la eksplodon de tiaj militoj, ĝis oni fine sukcesos forigi ĉiujn nukleajn armilojn.

La tradukinto Kenneth G. Linton estas konata esperantisto de Aŭstralio pro sia *Kanako el Kananam*

kaj Esperantaj lernolibroj. Escepte de kelkaj bagatelaj stumbloj kaj preseraroj, ekz. "unumaniere kaj alia ni pasigis ekscitan tempon" povus esti *iamaniere (iel)*... (p.36), "pli bone estas teni al la reguloj" ... *sin teni al* ... aŭ ... *observi -n* (p.187), "supro-supre" *mal-supro-supre* (p. 198), "pantolono" *pantalono* (paĝoj 12, 179), estas vera ĝuo frandi la Esperantan tradukon de la romano, kiu estas tute flua kaj bela.

Jiang Hongzhang (Ĉinio)

Distra popolkulturo

Rakontoj pri Afanti; Ĉinaj popolaj rakontoj. El la ĉina trad. Fan Yuzu. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1983. 71p. Ilus. 18cm. Prezo: 3,00 gld.

Ĉi tiu libreto estas kolekto de ĉinaj popolaj rakontoj, devenantaj de la parola literaturo de la ujgura nacieco. La rakontoj temas pri homo nomita Nasrudin Afanti, kiu estas legenda heroo ne nur ĉe la ujguroj, sed ankaŭ ĉe aliaj naciecoj tre disaj. Heroo li estas, ĉar li aŭdace primokis la siatempajn riĉulojn, ministrojn kaj reĝojn, malkaŝante iliajn burĝan stultecon kaj feŭdajn krimaĉojn per sia saĝo kuraĝe pru-



denta kaj sprite ruza. Pro tio la rakontoj estas samtempe distra legaĵo kaj signifoplena popolkulturaĵo.

La unuopaj rakontoj estas sufiĉe mallongaj por esti uzataj kiel dumleciona kursmaterialo, ekz. por laŭtleĝado, diktado, peraŭda kompreno kaj simile. Ankaŭ por lernaj celoj la lingvaĵo estas modela, kaj la prezo estas bonvene favora. Mi rekomendas la libreton al iu ajn. Ĝi estus ĉarma donaceto por esperantista amiko.

Graham Cansdale (Nederlando)

Signifoplena faka literaturo

Apliko de komputiloj en industrio kaj administrado, red. I. Koutny. Budapeŝto: NJSZT, 1982. 175p. (+ ĉ. 40p. da anoncoj). 24cm. Mimeo. ISBN 963 8431 30 6. Prezo: 18,00 gld.

Mikrokomputiloj, periferioj kaj aplikoj, red. I. Koutny. Budapeŝto: NJSZT, 1982. 164p. (+ ĉ. 40p. da anoncoj). 24cm. Mimeo. ISBN 963 8431 28 8. Prezo: po 18,00 gld.

Fine de 1982 en Budapeŝto okazis Internacia Komputoscienca Simpozio kaj Ekspozicio (Interkomputo '82, vd. *Esperanto*, n-ro 925), kaj jam antaŭ tio aperis ses kajeroj de ties prelegaro.

La dua kajero *Mikrokomputiloj, periferioj kaj aplikoj* enhavas 17 prelegojn. Post ĝenerala enkonduko (kio bedaŭrinde mankas al aliaj kajeroj), oni prezentas la situacion en Usono. Sekvas tri artikoloj pri Hungario: la situacio, efektivaj modeloj kaj klubaj atingoj. El tiuj kontrastiĝas, ĉu komputiloj estas atingeblaj de privatulo (Usono) aŭ ne (Hungario). Aperas du raportoj pri provaj produktaĵoj: unu pri *programaro* kaj la alia pri *aparataro*. Cetere tiuj terminoj tiel enradikiĝis, ke la *PIV*-aj *softvaro* kaj *hardvaro* tute ne troviĝas. Aperas tri prelegoj pri aplikoj en urba trafiko, librotenado kaj vendeja administro, unu pri matematika modeligo kaj tri pri periferioj, nome vidigilo, multipleksiloj kaj mikrofilma eligo. Du artikoloj prezentas algoritmojn de bildoprocezoj – nome kolorplenigon kaj eliminon de nevideblaĵoj, kie tamen la nun plej popularaj metodoj por mikrokomputiloj ne estas emfazataj – kaj unu prezentas indonezian datum-reton.

La tria kajero *Apliko de komputiloj en industrio kaj administrado* entenas 14 prelegojn. La unuaj tri estas kvazaŭ lernolibro por komputiligado en entreprenoj mezgrandaj (por japanoj), kun datumbazo. Laŭ mia naŭva koncepto, en plan-ekonomiaj socioj aferoj devus esti pli centralize datumigitaj. Estas du pliaj pecoj pri efektivaj spertoj en entreprenoj, unu pri inform-retrovado, tri pri apliko de operaci-esploraĵoj metodoj, unu pri socia kondiĉo kaj kvar pri industriaj/inĝenieradaĵoj aplikoj, el kiuj kolorrecepto estis al mi plej interesa. Krome, anoncoj de firmaoj aŭ institucioj en la fino de ĉiu kajero estas interesa legaĵo.

Gravan rolon havas la kajeroj por la normigo de la terminoj, kaj fortan influon havis la hungare eldonita terminaro *Komputilteknika vortaro* (1972). Kvankam iuj uzas *komputero* kaj *dateno*, la prefero al *komputilo* kaj *datumo* estas klara. Certe tiu tendenco estas sentebla en la gazeto *Internacia komputado*, eldonata samlande. Antaŭe mi estis skeptika pri la uzo de *storo*, *karaktro* ktp., sed la kajeroj konvinkis min pri ilia utileco. Tamen *karaktro-rekonado* devas

esti *liter-rekonado*. Legante la du kajerojn, oni familiariĝas kun la nocioj, de eta maŝinparto ĝis naciskala sistemo, kio pruvas la vivpovon de Esperanto en la fako, kvankam ne ĉio estas orda.

La pli ol mil paĝoj de la sume ses kajeroj estas tre signifoplena en la faka literaturo, ĉar miascie neniu alia fako sukcesis en Esperantujo eldoni tiom en unu fojo.

Ŝajne jam kondiĉoj iĝas maturaj por verki ne nur unuopajn raportojn sed sistemigitan kolekton de lernolibroj aŭ klerigaj libroj. Ekzemple la du bildoprilaraj algoritmaroj en la dua kajero fakte povus iĝi ĉapitroj de tiukampa norma lernolibro.

La kajeroj do estas indaj kaj endaj al komputistoj, tiel ke ĉiu povos trovi ion siafakan. Fine tamen mi devas lamenti pro la mizera bindo, ĉar mi jam ĉe eklego ĝisrevidis iujn kovrilajn paĝojn.

Zyun'iti Sibayama (Japanio)

Libro kontraŭ interezo

La mirakla insulo Baratario (1922), Silvio Gesell (1862-1930). El la hispana trad. germanen K. Rosenfeld, en Esperanton trad. P. Rulofido. Soest: Universala Ligo, 1983. 24p. Ilus. 21cm. Prezo: 4,50 gld.

Silvio Gesell estis fervora kaj fekunda germana idealisto, kiu strebis plibeligi la mondon plursfere. La kaŭzon de ĉiu malfeliĉo li vidis en la interezo por mono kaj li volas provizi la ekonomion per seninterza interŝanĝilo.

Ĉefa lia tezo estas, ke mono ne bezonas kovron, ĉar ĝi estas kovrita per la aĉetpovo en ĉiu butikoj, per la produktaĵoj, eĉ per la preteco de la tuta ekonomio ĉiam liveri kontraŭ pago de tiu mono.

Baratario signifas la landon de malmultekosta vivado, kiu tamen pro la funkcio de la mono fariĝas Kararia, la lando de multekosteco. En la rakonto la heroo, Diego Martinez, estas ege laŭdata pro sia klara argumentpovo, sed li neniam sukcesas ricevi la akcepton de la simplaj civitanoj, kiuj ĉiam voĉdonas por la alternativaj proponoj. Oni difinas kiel monkovron sinsekve oron, terpomojn, stalsterkon... Denove estiĝas interezo. Mono fariĝas valorkonservilo, restas en la kaso de la monposedantoj sed mankas al la entreprenistoj. Oni ekspluatas kaj amasigas grandegajn profitojn.

La esperantiginto elektis el pluraj eldonoj la novan tekston pri eterna problemo, kies solvon multaj anoncas, sed kies plenumon oni ankoraŭ atendas.

Malmulte estas dirite pri troa teknika produktivo kaj ŝrumpantaj materialaj provizoj.

Lingve, mi iomete miris pri la nocio "poo de interŝanĝo" (p.8), "pooj de profito" (p.13) por procento aŭ mon-unuo.

La demokratia diskuto daŭru. Ĝi antaŭiras la faron.

Jozef Hartl (Aŭstrio)

Bestetoj, bestegoj kaj bestaĉoj, Sylla Chaves (1929) kaj aliaj. Rio-de-Janeiro: Brazila Esperanto-Ligo, 1983 (ne indikite). 30cm. 33 t/m. Monofona. 15-paĝa illus. diskokovrilo. SC-014. Dulingva: portugala-Esperanta. Disko de ĉefe porinfanaj kantoj, kun dulingva teksto, abunde ilustrita, kaj portugallingva prezento de Esperanto. Prezo: 27,00 gld.

Ĉu vi konas la teron?; Ĉapitroj el la geologiaj sciencoj, Endre Dudich. Budapeŝto: Scienca Eldona Centro de UEA, 1983. 150p. (+ 68p. da anoncoj). Ilus. 23cm. ISBN 963 571 080 1. Altnivela enkonduko en la geologion, kiu kun abundaj figuroj kaj tabeloj traktas geononion, geokemion, mineralogion, dinamikan geologion, petrologion kaj sedimentologion, paleontologion, tektonikon, ter-interton, terhistorion kaj stratigrafion, aplikajn geofizikon kaj geologion, kosmogeologion kaj planedologion, kun terminaro kaj bibliografio. Prezo: 12,00 guldenoj.

D-ro Zamenhof, Esperanto kaj la Esperanto-movado, Adriana J. Middelkoop (1913). Hago: Esperanto-Centrum Nederland, 1984 (3a eld.). 16p. Mimeo. 21cm. Konkiza faktaro por la nederlanda elementa ekzameno pri Esperanto. Prezo: 2,40 gld.

Esperanto aŭtodidakte; Internacia lernolibro de la Internacia Lingvo (1983), Audrey Childs-Mee (1926). Antverpeno-La Laguna: TK/Stafeto, 1983 (2a eld. reviziita). 194 + 40p. Ilus. de S. Marković. 21cm. ISBN 90 6336 029 0. Rektmetoda lernolibro verkita precipe por la bezonoj de aŭtodidaktaj lernantoj, sed taŭga ankaŭ por kursoj. Kun ŝlosilo por la ekzercoj kaj kun indeksoj. Prezo: 24,00 gld.

Esperanto, une approche de la langue internationale (1979). Paris: Union Française pour l'Espéranto, 1984 (2a eld.). 60p. Ilus. 15cm. Konkiza gramatiko, dudirekta vortareto, adresaro kaj aktualaj informoj, kun librolisto. Prezo: 3,30 gld.

Knabino Ginsengo, komp. Jiang Cheng'an kaj Wu Daisheng. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1983. 38p. Kolorilus. de la aŭtoroj. 19cm. 88-Es-177P. Porinfana fabelo pri la origino de la drogherbo Ginsengo. Prezo: 3,00 gld.

Konsolo de la filozofio, Boethius (ĉ. 480-524). El la latina trad. Albert Goodheir (1912). Glasgovo: Kardo, 1984. 146p. 21cm. ISBN 0 905149 21 1. La plej grava verko de la romia filozofo Boecio, kiu traktas naturan teologion. Prezo: 17,40 gld.

Kvarteto de Mendelssohn kaj aliaj rakontoj, La, Jarosław Iwaszkiewicz (1894-1980). El la pola trad. Jerzy Grum. Varsovio: Pola Esperanto-Asocio, 1982. 103p. Ilus. 21cm. ISBN 83 7013 006 2. Ok elektitaj rakontoj de konata pola verkisto. Prezo: 10,50 gld.

Language and Language Learning; Report of a Conference. New York: Center for Research and Documentation/Esperantic Studies Foundation, 1983. 95p. 29cm. Anglalingva raporto de konferenco pri la lingvo kaj lingvolernado, aranĝita i.a. de CED (Novjorko, 15 dec. 1982); 7 prelegoj kaj paroloj de gravaj edukistoj, Humphrey Tonkin, Bruce Arne Sherwood. Prezo: 22,50 gld.

Languages of the World, The (1977), Kenneth Katzner. London: Routledge and Kegan Paul, 1984 (represo). 374p. 23cm.

Bind. ISBN 0 7100 8717 9. Anglalingva konsultlibro pri ĉirkaŭ 600 lingvoj de la mondo (inkl. Esperanton), kun priskribo kaj tekst-ekzemploj. Prezo: 60,00 gld.

Leksikon društveno-političke i samoupravne terminologije srpskohrvatski-esperanto / Leksikono de socipolitika kaj memadministra terminologio serbokroata-Esperanta, komp. Novak Strugar. El la serbokroata trad. A. Sekelj. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1983. 49p. 20cm. Prezo: 9,90 gld.


Lirika poemaro el Vojvodino (Serbio), komp. Boriša Milićević (1931). El div. lingvoj trad. plejparte la kompilinto. Novi Sad: Literatura Komunumo, 1983. 98p. 20cm. Antologio de 64 poemoj de 43 poetoj el la plej multlingva provinco de Jugoslavio, kun bibliografio. Prezo: 12,00 gld.

Psikologio kaj metodiko de Esperanto-instruado, Boris V. Tokarev (1927). Soveta Unio: sen bibliografiaj detaloj, 1984. 48p. Mimeo. 20cm. Gvidilo por Esperanto-instruistoj, kun prezento kaj kritiko de multaj instrumentadoj. Prezo: 4,50 gld.

Rakonto pri Ekeko/Priĉa o Ekeku, Judita Rey Hudeček. El la kroata trad. S. Štimec kaj Z. Tišljar. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1984. 18p. Ilus. de Z. Zimović. 20cm. Dulingva: kroata-Esperanto. Vigla rakonto pri la praa bolivia dio (kaj kulturo). Prezo: 3,00 gld.

Salale!, Farok Topan kaj Ebrahim Husein. El la svahila trad. Nino Vessella. Pisa: Edistudio, 1984. 175p. 21cm. ISBN 88 7036 021 0. Du modernaj, socie engaĝitaj tanzaniaj teatraĵoj, *Gustuminto paradizon* kaj *Diabloj*, kun orientafrika islama kultura fono. La unua afrika traduko en la Internacia Lingvo. Prezo: 24,00 guldenoj.

Tri plus kvar, A. Lopez Luna. Buenos Aires: Amigos de Lopez Luna, 1984. Mimeo. 17cm. ISBN 950 562 659 2. Naŭdek tri mallongaj rakontoj. Prezo: 7,20 gld.



Vivo de d-ro L.L. Zamenhof en bildoj, La, Henk Thien (1911). Nederlando: la aŭtoro, 1984 (ne indikite). 128p. Ilus. Mapoj. 30cm. Dokumenta bildlibro, kompilita de la fondinto kaj prizorganto de la Foto-Servo pri Zamenhof; 114 fotoj kaj 25 mapoj sur luksa papero. Prezo: 30,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 5%, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 guldenoj. Antaŭdankon pro via mendo!

Kontribuojn sendu al la ĝenerala sekretario de TEJO: N. Saletti, Via Libia 20/4-1, I-40138 Bologna.

Pri neperforto en Rimini

De la 17a ĝis la 23a de aprilo 1984 okazis seminario de Komisiono por Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO en la konata itala banloko Rimini sur la adriatika marbordo. La seminarion partoprenis dudeko da gejunuloj el ok landoj. Ĝia temo estis "modeloj de neperforta solvado de konfliktoj". Tiun temon oni pritraktis laŭ diversaj manieroj, t.e. ke oni havis eblecon iel praktike trakti la temon anstataŭ tutsimple aŭskultadi prelegojn kaj diskutadi. Tiurilate estis tre ĝuinda la sidblokada, kiun organizis la laborgrupo gvidata de Roland Schnell (FR Germ.): la grupo iom teorie okupiĝis pri la temo de neperforta rezisto, kaj rezulte sidblokis la hotelan manĝejon postulante, ke la seminariestro Dario Besseghini (Italujo) iru naĝi en la maro laŭ sia informila aserto, ke eblas naĝi en la tiea maro en tiu sezono! Sukcesis la postulo per tio, ke Dario kuraĝe ennaĝis la efektive malvarman maron.

Alian praktikan programeron kontribuis Rainer Heckhausen (FR Germanio). Temis pri la tiel nomataj "novaj ludoj". Tiuj usondevenaj novaj ludoj malsamas al kutimaj ludoj en tio, ke mankas en ili elementoj de konkurenco kaj supervenkemo. Male, oni ludas ilin por ĝui la *kunludadon* kaj por tiel ĝoji. Oni celas per ili memedukon al neperfortemo.

Malgraŭ tio, ke mi aparte laŭdis la praktikajn programerojn, la prelegoj ne estis malpli ĝuindaj. Enkonduke Claude Piron (Svislando) informplene kaj aŭskultinde prelegis pri "Kial ni revas 'promesitajn landojn'?", sciigante pri la tiutemaj teorioj de diversaj eminentaj psikologoj, kompreneble inkluzive de Freud. Umberto Broccatelli (Italujo) prelegis pri federalismo, kiel paca ideologio, eĉ proponante la tezon, ke federalismo per si mem malebligas militon. Kontraste al tia pripaca teoriumado, Violetta de Filippo (Italujo) informis nin pri la "forgesita" landlima milito inter Etiopio kaj Somalio. La pastrigonta Ian Tarrant (Britujo) ofertis ankoraŭ alian vidpunkton, proponante en sia prelego kristanajn modelojn por la solvado de konfliktoj.

Oni ekskursis al la respubliko San-Marino por vidi kiel ŝtato tiel malgranda sukcesis travivi la epokojn, sen esti surtretita de pli grandaj ŝtatoj. Oni provizis la seminarianojn per tekstoj kun ekzemploj de "neperforta solvado de konfliktoj", ĉerpitaj el la historio de San-Marino.

Krome la seminarianoj spektis filmon pri la atom-bomb-atako kontraŭ Hiroŝimo kaj Nagasaki, kiel ekzemplon plej ekstreman de perforta finsolvado de

konflikto. La filmo enhavis eĉ filmerojn surloke filmitajn en 1945, kiuj estis aparte hororaj kaj maltrankviligaj, same kiel la aktualaj bildoj de viktimoj, kiuj vivas ankoraŭ kun hororaj malsanoj kaj korpaj difektoj.

Teatra grupo La Luna, konsistanta el italo kaj danino, prezentis senparolan teatraĵon kun la titolo "Romeo kaj Julieta". Ĝi tamen nur laŭ la titolo similis al la konata teatraĵo de Ŝekspiro. Ĝi distre, sed pensige pritraktis interpersonajn konfliktojn kaj obstrukcojn al ties solvado.

Vespere oni ĝuis riĉan programon de alispecaj prezentadoj, provizitaj de la paralele okazanta Internacia Festivalo de Itala Esperantista Junularo. La eble ununura Esperanta rokmuzika grupo Amplifiki, konsistanta el dano kaj du svedoj, plurfoje dum la semajno ravis la gejunulojn per siaj viglostilaj prezentadoj. Oni tre distriĝis ankaŭ de la nekredeble diversstila kantaro de Johán Valano.

Entute oni taksis la seminarion inter la plej sukcesaj kaj ĝuindaj.

Graham Cansdale

Festivalo en Moskvo

Venontjare okazos en Moskvo la 12a Monda Festivalo de Junularo kaj Studentoj. Tiun festivalon organizas Monda Federacio de Demokrata Junularo, kun kiu TEJO jam delonge kunlaboras pri la demandoj de komuna intereso. KER de TEJO sukcesis reprezentiĝi en ambaŭ jam okazintaj preparkunsidoj pri tiu festivalo. Csaba Lendvay (Hungarujo) ĉeestis la unuan preparkunsidon fine de februaro en Havano, Kubo. Li raportis, ke oni pozitive akceptis lian alparolon, en kiu li skizis, kio estas Esperanto kaj kio estas TEJO. Li krome proponis, ke ĉiu nacia preparkomitato tie reprezentita kontaktu la esperantistan junularon en sia lando cele al kunlaboro.

Ankaŭ Marie Vanĉurová, estrarano de TEJO, surpriziĝis pri la tre pozitiva akcepto, kiun havis ŝia kontribuo. Tio estis dum la dua festivala preparkunsido meze de aprilo en Sofio, Bulgarujo. Ŝi prave konsilas, ke TEJO kaptu la okazon kaj bone eluzu tiun intereson pri kunlaboro, por aperi kiel rimarkinda kaj grava kultura organizaĵo dum la Festivalo. Ambaŭniaj reprezentintoj raportis, ke iliaj kontribuoj iom elstaris pro konkreteco, kompare kun nebulaj elpaŝoj de la plimulto de la aliaj organizaĵoj.

Adressanĝo Haase: Bonvolu noti, ke la vicprezidanto de TEJO, Martin Haase, havas novan adreson: Gutenbergstr. 38, D-5000 Köln 30, FR Germanio. Bedaŭrinde li ne estas telefone atingebla ĉe tiu adreso.

● **FR Germanio:** Post gazetara konferenco, kiun organizis la gazetara komisiito Louis von Wunsch-Rolshoven en Niendorf dum la Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo, artikolo de la plej granda germana novaĵ-agentejo Deutsche Presseagentur furoris en la tuta lando. D-ro Rudolf Fischer, vicprezidanto de Germana Esperanto-Asocio, havis du intervjuojn, en Radio Luksemburgo kaj Sudokcidenta Germana Radio. Al la 62a Germana Esperanto-Kongreso en Kassel venis la regiona televido. Oni konstatas el la enlanda statistiko pri informado, ke la redakcioj de FR Germanio daŭre pli interesiĝas pri la fenomeno Esperanto.

● **Francio:** La grava franca ĵurnalo *Le Monde*, eldonata en 550 000 ekzempleroj, favore menciis Esperanton en artikolo je la 18a de januaro pri la stato de Unesko, kulpigante, ke oni ne elektis jam en 1946 ununuran neŭtralan oficialan lingvon por UN kaj ties fakaj filioj kiel Unesko. La 7an de februaro oni raportis, ke la leterreagoj estis grandparte favoraj al neŭtrala internacia lingvo.

● De kelkaj monatoj nova ekspozicio de Orientfranca Esperanto-Federacio, aranĝita de Pol Denis, daŭre vojaĝas de lernejo al lernejo tra la regiono.

● Sekve de informa tago en la universitato de Vincennes-Paris VIII, Parizo, oni je la 28a de februaro malfermis oficialan nedevidan kurson de Esperanto sub la gvido de d-ro François Lo Jacomo.

● **Kolombio:** Laŭ informo, kiun ni ricevis pri sveda esperantisto, Henry Thomander, kiu ĵus vizitis Kolombion, funkcias en la ĉefurbo de tiu lando, Bogoto, Esperanto-lernejo. Fondis la lernejon s-ro Luis Jorge Santos-Morales, kiu ofertas unumonatajn kursojn. Oni raportis ne nur pri modernaj lokalo kaj instruhelpiloj, ke kotizo de UEA eniras la kursokotizon, sed ankaŭ ke aperas en la televido, radio kaj ĵurnaloj reklamoj pri la kursoj. Henry Thomander renkontis 25 partoprenantojn de tiuj kursoj.

● **Malto:** Ĉi-jare Esperanto-Societo Malta iniciatis kaj sukcese festis la Semajnon de Internacia Amikeco kune kun du aliaj kulturaj organizaĵoj, "Movado por Literatura Renesanco" kaj "Ni Helpu per la Arto". En la programo ĉiu societo prezentis sian celon al la ĉeestantoj, inter kiuj estis s-ro Harry Holmes, vicprezidinto de UEA. Oni planas ripeti tian komunan aranĝon.

● **Rumanio:** La redakcio lastatempe ricevis aron da informoj el Rumanio, el kiuj montriĝis, ke la tiea Movado ne malmulte aktivas. Rilate eksteran informadon, rumanaj gazetoj skribis pri la budapeŝta Universala Kongreso: *Flacara* jam la 19an de aŭgusto, kaj *Magazin* kaj *Romania pitoreasca* la postan monaton. *Forum studentese* aperigis intervjuon en oktobro, ankaŭ ĝi pri la UK. En la alma-

nako de la gazeto *Flacara* por 1983 oni publikigis artikolon pri Esperanto, verkitan de prof. I.C. Bociort. Ankaŭ Radio Bukareŝto kelkfoje menciis Esperanton lastatempe.



● **Pupteatro:** Post gajno de premio en la pasintjara Pupteatra Internacia Festivalo en Jugoslavio, la sveda pupteatro Totem el Uppsala denove prezentis antaŭ esperantista publiko kadre de la Sveda Esperanto-Kongreso en Skövde pasintan majon. Andrzej Dziedziul, Lilian Gustavsson kaj iliaj pupoj ludas *La fajfilo* de Hans Andersen. Fotis la loka ĵurnalo *Skövde Nyheter*, kiu aperigis ĉirkaŭ kvin paĝojn pri la kongreso kaj komencis Esperanto-kurson.

● **Svedio:** Ekde decembro pasintjare oni starigis Esperanto-ekspozicion en la centra Biblioteko de Gotenburgo. Post tri semajnoj tie la sukcesa ekspozicio migris tra 30 lokaj filioj de la Biblioteko dum entute 20 semajnoj. Lige al tio aperis la 15an de marto plene pozitiva, tutpaĝa intervjuo kun veterana aktivulo Lennart Åberg en la loka ĵurnalo *Göteborgs-Nytt*.

● De la 27a de aprilo ĝis la 1-a de majo okazis apud Höör sveda-pola studkonferenco, aranĝita de Sveda Esperanto-Federacio kaj Monda Turismo. La 31 partoprenantoj el ambaŭ landoj studis la sud-svedan regionon Skanio el historia, geografia, socia kaj turisma vidpunktoj.

Informo

Jen:

La Federacia Respubliko Germanio



● **FR Germanio:** Ĝus aperis bela, plenkolora faldfolio *La Federacia Respubliko Germanio*, eldonita de la Oficejo por Gazetaro kaj Informado de la Registaro. La informilo donas koncizajn informojn pri la ekonomio, socio, kulturo, turismo ks. de la lando. Ĝi estas senpage ricevebla i.a. de Deutsche Zentrale für Tourismus, Beethovenstr. 69, D-6000 Frankfurt a.M. I, FR Germanio.

Plurtage partoprenis la aranĝon la komunumestro de Höör, kio en Svedio estas malofta okazaĵo.

● **Irano:** Al koresponda Esperanto-kurso por studentoj, organizita de d-ro Hosejn Vahidi (Teherano), aliĝis mil studentoj el la tuta lando. D-ro Vahidi, emerita edukdirektoro kaj instruisto de komerca altlernejo, utiligas kiel instrumaterialon la du konatajn verkojn de Ferenc Szilágyi – *Konversacia Esperanto-kurso* kaj *Ellernu*.

● **Venezuelo:** Okaze de la pasintjara Zamenhof-Tago oni fondis Esperanto-klubon en Marakajbo, kie jam de pluraj jaroj loka aktivulo David Valecillos gvidas kursojn.

● **Srilanko:** La 30an de januaro Esperanto-Grupo Srilanka okazigis ekspozicion pri la Internacia Lingvo. Post tio s-ro Stéfane Keller el Svislando gvidis kurson en la Publika Biblioteko de Kolombo. La kursanoj plulernas sub la gvido de s-ro Daniel Balasingam Jesudasan, kiu respondecas pri Esperanto-Grupo Srilanka. La Grupo nun havas 42 membrojn, sed ĝi perdis multe de siaj Esperantaj materialoj en la intertnaj tumultoj. Ĝi do aparte bonvenigas alsendojn de lerniloj, vortaroj ks. al: Esperanto-Grupo Srilanka, ĉe s-ro D.B. Jesudasan, 71 Pagoda Para, Nuĝegoda, Srilanko.

● **Soveta Unio:** De la 19a ĝis la 23a de marto Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE) okazigis la unuan seminarion por gvidantoj de Esperanto-kluboj. La 70 partoprenantoj, kiuj inkluzivis la prezidanton de ASE, prof. Mahomet Isajev, venis plejparte el la eŭropa parto de Soveta Unio kaj diskutis internan agadon, instruadon kaj informadon.

● **Venezuelo:** Ekde aprilo funkcias Esperanto-sekcio en la grava kaj moderna Metropola Biblioteko de la venezuela ĉefurbo Karakaso. Ĝia direktorino, Doris Spencer, pretas helpi instruadon de Esperanto en tiu centra biblioteko kaj ofertis ĝin kiel ejon por la 2a Nacia Renkontiĝo de Esperantistoj kaj Amikoj de Esperanto en Venezuelo, kiu okazos de la 12a ĝis la 14a de oktobro. Informojn oni povas peti de Venezuelo Esperanto-Asocio, Apartado 47675, Caracas 1041-A, Venezuelo.



● **Arkivoj:** La 28an de marto Centra Ŝtata Arkivejo de Bulgario akceptis por ĉiama gardo la arkivon de Bulgara Esperantista Asocio el la periodo 1966-72. Ĝi entenas 42 arkivajn unuojn kun 3 706 folioj. Tio estas la dua akcepto de Esperanta arkivo fare de tiu arkivejo. En 1972 ĝi akceptis 37 arkivajn unuojn kun 3 812 folioj. Esperantaj arkivoj troviĝas ankaŭ en Centra Ŝtata Historia Arkivejo en Sofio kaj en la distriktaj arkivejoj de la urboj Veliko Târnovo kaj Pleven.

● **Radio:** Kiel ĉiujare, ankaŭ la ĉi-jara, 38a eldono de la aŭtoritata *World Radio TV Handbook* (Monda manlibro pri radio kaj televido) enhavas apartan liston (p.441) de elsendoj en Esperanto. La kompilinto estas Georges Larglantier el Parizo, kiu kompilas similan liston por revuo *Esperanto*. Oni rimarku, ke en la manlibro aparta listo aperas nur por Esperanto kaj la angla, ne por aliaj lingvoj. La redakcia adreso estas: Billboard A.G., Søliljevej 44, DK-2650 Hvidovre, Danlando.

● **Brajla literaturo:** Antaŭ nelonge aperis en Moskvo ĉe la eldonejo Prosvesĉenie duvoluma brajla transskribo de la antologio *Estona soveta poezio*. Tiu kolekto unue aperis en kvin mil ekzempleroj en 1977, kompilita kaj tradukita en Esperanton de Hilda Dresen (1896-1981). La nova eldono estas jam la tria Esperanta brajlo-libro de estona literaturo.

● **Hortikulturo:** En la decembra numero de *Chronica Horticulturae*, la organo de Internacia Societo por Horti-

kultura Scienco, oni aperigis demandon, ĉu anoj de la Societo interesiĝas pri utiligo de Esperanto en sia profesio. Interesitaj hortikulturistoj skribu al Sekretariato de ISHS, De Dreijen 6, 6703 BC Wageningen, Nederlando.

● **Armeoj:** Antaŭ nelonge aperis oficiala gvidilo pri la brazila Supera Lernejo pri Milito en Rio-de-Janeiro. La 14-paĝa, ilustrita broŝuro estas en la portugala, hispana, germana, angla, franca kaj Esperanto. Oni informas, ke ĝi estas distribuata sole al vizitantoj de la Lernejo.

● **Malsato:** En la kvar unuaj ĉi-jaraj numeroj de la revuo *Crveni krst Srbije* (La Ruĝa Kruco de Serbio) aperis ampleksaj informoj pri la kunlaboro de esperantistoj en Malsato-Projekto (Davidgasse 79, A-1100 Wien, Aŭstrio) kaj pri la eblecoj utiligi Esperanton serve al la batalo kontraŭ malsato.

● **Muzeoj:** Okaze de renkontiĝo de cent komencantoj en Xhoris, Belgio, la loka muzeo eldonis inform-broŝuron en Esperanto. Ĝi estas mendebla kontraŭ 180 belgaj frankoj de s-ro F. Bosmans, 21 route de Comblain, B-4183 Xhoris, Belgio (poŝtgira konto n-ro 000-0983953-82).

● **Radio:** Kiel en la du antaŭaj jaroj Radio Pécs, regiona stacio de Hungara Radio, ankaŭ ĉi-jare havas kvinminutajn Esperantajn programojn kun turismaj kaj movadaj informoj. La elsendoj okazas de junio ĝis aŭgusto je 18h25 (16h25 UTC) per 344m (873kHz), 71,81MHz kaj de Nagykanizsa per 71,03MHz. Se vi sukcesas aŭskulti la lokan stacion, skribu al Radio Pécs, Esperanto-fako, Pf. 200, H-7601 Pécs, Hungario.



● **Jugoslavio:** De 1980 oni organizis jam dek sukcesajn kursojn de Esperanto en la Dua Gimnazio "I.L.Ribar" de Beogrado. La lernejo specialiĝas pri edukado de estontaj tradukistoj kaj filologoj. Ankaŭ la rektoro lernas Esperanton kun siaj gelernantoj.

● **Jubilea Jaro:** La 49a Kongreso de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio akceptis laborplanon de la estraro de NZEA por la Jubilea Jaro, pretigitan laŭ sugestoj de lokaj Esperanto-klubo. La estraro de NZEA respondecos pri la administrado kaj evoluigo de la laborplano kiel la Komisiono por la Jubilea Jaro en Nov-Zelando, uzante ideojn de membroj kaj de UEA. Por financi la agadon oni malfermis novan konton Fonduso J.T. Allan i.a. por ekstermovadaj kontribuoj.

● **Periodaĵoj:** Korea Esperanto-Asocio jam de la pasinta jaro havas oficialan organon, kiu titoliĝas *La lanterno azia*. Ĝi antaŭe estis la organo de Korea Ligo de Esperantistaj Instruistoj. *La lanterno azia* estas bone presita kaj aperas monate, plejparte en la korea lingvo. Ĝia redaktoro, Gim Bjonghŭan, estas bone konata juna aktivulo.

● **Poŝtmarkoj:** En la januara numero de la ĉina anglalingva revuo *China Philately* (Ĉinia filatelo) aperis unupaĝa artikolo de Yang Zhongqin pri Esperantaj poŝtmarkoj, publike eksponitaj dum Chinapex '83. La eksponaĵo ricevis arĝentan medalon.

● **Radio:** La 21an de majo, en sia anglalingva programo Radio Moskvo parolis pri la utileco de la satelitoj por la plibonigo de la radio-televidaj ondoj. La programo aparte atentis la lingvan dimension en la klopodoj profiti internaciskale de la novaj teknikaj evoluoj. Ĝi menciis ankaŭ la eventualan rolon de Esperanto kaj asertis, ke tiu nova (!?) mondlingvo trovas multajn adeptojn i.a. en Usono kaj Kanado.

● **Universitatoj:** La 17an de februaro vicrektoro de la Universitato de Cantho en Vjetnamio subskribis planon pri scienca kaj teknika agado de la Fremdlingva Fakultato por la Jubilea Jaro de Esperanto. En la plano estas fondo de universitata esperantista grupo, konsistanta el scienca-teknika grupo, filologia-literatura grupo kaj Esperanto-klubo. Krome oni malfermos Esperanto-klasojn kaj ekspozicios librojn, revuojn, bildkartojn ks. Por ĉi tio oni aparte petas helpon per sendoj de Esperanta materialo al d-ro Le Phuoc Nam, To Thong Tin Xuat Ban, Phong Quan Ly Khoa Hoc, Truong Dai Hoc Cantho, Haugiang, Vjetnamio.

Nekrologoj

ELISA CHAMPY (1895-1984) forpasis la 1-an de aprilo en Thimister, Belgio. Ŝia patro partoprenis la unuan Universalan Kongreson de Esperanto en 1905, kaj ŝi renkontis Zamenhof en sia familia domo, okaze de la antverpena UK en 1911. Ekde tiam ŝi aktivis por diversaj kluboj en Belgio, ankaŭ kiel instruanto.

BRAZ COSENZA (1914-1984), advokato, mortis la 25an de marto en Rio-de-Janeiro, Brazilo. Li fondis Kulturan Kooperativon de Esperantistoj en 1951 kaj estis ĝia prezidanto dum pli ol 30 jaroj. Li kunlaboris en la organizado de multaj Esperantaj konferencoj kaj en la vigla eldona agado de la Kooperativo. Li estis fakdelegito kaj membro de UEA de post 1951.

SERGEJ VASILJEVIČ FILIPPOV (1899-1984), elektroteknikisto, mortis la 16an de aprilo en Irkutsk, Soveta Unio. Li estis la plej malnova esperantisto de sia urbo, kie li funkciis kiel la delegito.

KARL HÄRNQVIST (1889-1984) mortis antaŭ nelonge en Vimmerby, Svedio, kie li estis la delegito.

WALTER KAUKAL (1903-1984), elektro-inĝeniero, mortis la 28an de aprilo en Neustadt/Weinstrasse, FR Germanio. Tie li fondis en 1965 la konatan Esperanto-Centron Rejnland-Pala-

tinato. Li estis aktiva membro de 13 Esperanto-organizaĵoj, instruis en pluraj kursoj, verkis pli ol 1 500 gazetartikolojn kaj financis i.a. ne malpli ol 31 dumvivajn membrecojn de UEA.

BROR LINDSTRÖM forpasis antaŭ nelonge en Vattholma, Svedio. Li dum multaj jaroj estis membro-subtenanto kaj ano de Societo Zamenhof.

MIROSLAWA MARCINIĄK forpasis la 31an de marto en Poznań, Pollando.

H.W.R. PETERSEN (1921-1984), majoro, forpasis la 22an de aprilo en Nov-Zelando. Li estis dum multaj jaroj redaktoro de *Nov-zelanda esperantisto* kaj ĝis sia morto li prizorgis la libroservon de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio. Li estis fakdelegito pri Esperanta literaturo.

HANS PETERSSON (1903-1984) mortis la 2an de majo en Lund, Svedio, kie li estis tre aktiva en la loka klubo. Li estis membro de UEA ekde 1937, delegito kaj membro de Veterana Esperantista Klubo. Jam 80-jara li kuntradukis *Paclibro* de Bernard Benson.

J. VAN SELMS forpasis antaŭ nelonge en Groningen, Nederlando. Ŝi estis dumviva membro de UEA.

GIANLUIGI SPERTINI (1939-1984) forpasis antaŭ nelonge en Italio. Li estis dumviva membro de UEA kaj ankaŭ delegito.

Persone

● **Frank:** La 24an kaj 25an de marto prof. Helmar Frank (FR Germanio) gvidis 12-horan Esperanto-kurson por sciencistoj kaj teknikistoj en Rosario, la dua urbo de Argentino. Partoprenis la apartan kurson ĉirkaŭ 30 sciencistoj kaj teknikistoj el la Kibernetika-Pedagogia Grupo de Nacia Universitato de Rosario. Frank krome donis kvar fakajn kursojn pri kibernetiko, du el ili en Esperanto kun interpretado. Aktive kunlaboris Rosaria Esperanto-Asocio.

● **Sekelj:** Furoras la japana traduko de *Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo* de Tibor Sekelj, kies Esperantan originalon eldonis TK/Stafeto en 1979. La japana

Ministerio pri Edukado envicigis la tradukon inter la dek kvar plej bonajn junularlibrojn de 1984. Tio signifas, ke multaj japanaj infanoj verkos pri ĝi eseon en tutlanda konkurso. La japana eldonejo ankaŭ invitis la aŭtoron prelegvojaĝi en Japanio, por ankoraŭ pli popularigi la verkon.

● **Trixi:** En marto la konata Movada magiisto Trixi gastis en Jugoslavio. Invitita de Kultura kaj Informa Centro de FR Germanio okaze de karnavalo, Trixi ne preterlasis la okazon prezenti ankaŭ por esperantista publiko en Zagrebo. Li turneis jam en 32 landoj.

Anoncetoj

Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncetoj.

Deziras korespondi kun tiuj, kiuj planas viziti Japanion en la estonteco s-ro Huzimaki Ken'iti, Okaisiki 501, Numazu-si, Sizuoka-ken, 401 Japanio.

19-jara litova junulo deziras korespondi pri la Esperanto-movado, filatelo kaj muziko. S-ro Gintaras Žiaunys, Žemaitijos 9-25, SU-235500 Mažeikiai, Lito-vio, Soveta Unio.

Aŭguste ni festos nian 50an datrevenon. Ni dankos pro ĉiuj salutkartoj, kiuj helpos aranĝi ekspozicion. Rosaria Esperanto-Asocio, Santa Fe 955, RA-2000 Rosario, Argentino.

Zaira studento pri pedagogio, 19-jara, deziras korespondi pri ĉiuj temoj. S-ro Tufuene Mafuila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaire), Zairio.

1. Facilaj dialogoj: La sukcesa helpilo por lerni/lernigi konversacion. Afrankite: 28 frankojn. **2. Por plivastigi nian movadon:** Praktikaj konsiloj kaj utilaj rekomendoj ofte laŭdataj. Afrankite: 28 frankojn. – Ĉe libroservoj kaj Ligue Française "Pro UNESCO", 24 avenue Riedisheim, F-68100 Mulhouse. Poŝta konto: 16.233.37 C Paris.

Tri ĉinaj geesperantistoj, 22- kaj 42-jaraj, deziras korespondi i.a. pri medicino, literaturo, kuirado, instruado, kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. S-ro Feng Jinghou, Taiping lang, Dajing Yiyuan, Guangji. Hubei, PR Ĉinio.

Nico, Lazura Marbordo, 30 marto – 06 aprilo 1985, Internacia Esperanto-Semajno. Matene kvin diversgradaj Esperanto-kursoj, posttagmeze ekskursoj. Kulturaj vesperoj. Tutrezervita hotelo (dipersojnaj ĉambroj kun bano/duŝo), tri manĝoj tage. Ĉio enkalkulita, popersone 1 395 F.F. Studentoj kaj infanoj 900 F.F. Petu prospekton: Llorens, Hortensias 2, 121bis Boulevard Napoléon III, F-06200 Nice, Francio. **Neniu aliĝo post la 1-a de oktobro.**

Kun ĝemeligitaj urboj de Saint-Etienne – Coventry, Ferrara, Nazareth, Lougansk – deziras Esperantan kontakton Esperanto-Klubo, 31 rue Tréfilerie, F-42100 Saint-Etienne, Francio.

Mongola junulo petas alsendon de diversaj lernolibroj de Esperanto kaj vortaroj Esperanto-anglaj kaj Esperanto-germanaj. Antaŭdankas s-ro Ts. Batzaya, Central Post, Poste restante, Ulan-Bator, Mongolio.

Studi matene, ferii posttagmeze, jen la kursformulo de la Internacia FERIA Altlernejo de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando). Petu informilon!

Korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn deziras Mehmet Telyakar, Aydinlik Sokak No. 23, Ortaköy, Istanbul, Turkio.

Fondgrupo por nova organizaĵo pri Esperanto en komerco kaj ekonomio invitas proponojn de kunlaboro. Aparte serĉataj estas tiuj, kies laboro iel rilatas al komerco aŭ industrio, ekzemple ĉe banko, asekura kompanio, trafika entrepreno, eldonejo, esplorinstanco aŭ simile. La provizora adreso estas: Komerca Fakgrupo, Postbus 25041, 3001 HA Rotterdam, Nederlando.

Info-Servo, i.a. eldonejo de Tutmonda Esperantista Adresaro, serĉas kunlaborantojn. Skribu al Info-Servo, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio.

35-jara scienca agronomo deziras interŝanĝi maksimum-kartojn kaj bildkartojn kun samhobiuloj tutmonde: Leonid Senj, Poŝtenska Kutija 16, BG-5000 Veliko Tirnovo, Bulgario.

Oficiala Informilo

SOCIETO ZAMENHOF 1984

Belgio: Germaine Wolff; Jules Verstraeten; Clara Peeters. Finnlando: Irja Kle-mola; Liisi Oterma. Francio: Jack-André Rousseau. Hispanio: Josep Castelltort i Riba. Nederlando: A.M.E. van Walsem-Schutte; J.S. Rooke; Ru H. Bossong; W.C. Keizer. Norvegio: Kjell Gustavsen; Kjell Peder Hoff. Svedio: Martin Säter; Signe Stenström. Svislando: Margrit Guldin. Usono: Alberta Seabold Casey; Cecilia Peterson; Thomas A. Goldman.

DONACOJ 1984 (Gld.)

ĝis la 1-a de junio.

ASOCIA KAPITALO: Nederlando: Heredaĵo s-ino A.H.E. Rostopchin-van Vliet 2 500,00. Sumo ĉi-jara: 11 590,65.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Argentino: Rafael Diaz Morilla 152,50. Belgio: G. Pirlot 34,77. Svedio: J. Hammarberg 10,00. Sumo ĉi-jara 6 085,39.

FONDAĴO CANUTO: FR Germanio: A. Bepperling 55,50. Norvegio: K. Gustavsen 334,08. Sumo ĉi-jara: 1 620,40.

FONDAĴO TEJO: Argentino: Rafael Diaz Morilla 152,50. Sumo ĉi-jara 172,00.

BUDAPEŝTA OFICEJO (TERMINOLOGIA SEKCIO): FR Germanio: S-ino R. Paintner 450,22. Sumo ĉi-jara 2 254,18.

FONDAĴO AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: Argentino: Rafael Diaz Morilla 305,00.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

PATRONOJ (minimуме \$100): Usono: Armin F. Doneis Sr.; Julius J. Manson; Elizabeth Manson; Lura R. Chapman; Moshe Lewin; Maria L. Murphy. SUBTENANTOJ (minimуме \$25): Aŭstralio: F.F. Kopper. Britio: Sybil V. Sly. FR Germanio: Hermann Teichmann. Francio: Paul Coulot. Japanio: Saburô Yamazoe. Nov-Zelando: Jeannie Wilson. Sud-Afriko: Colin S. Beckford. Usono: Ella H. Gibson; Eugene H. Thompson Jr.; Ruth Kaufman. AMIKOJ (minimуме \$10): Brazilo: Luiz Mario Santos da Silva. Hispanio: Ana Montesinos de Gomis. Italio: Gruppo Esperantista Trentino; Renata Bonvicini. Kanado: Alma More.

PATRONOJ DE TEJO 1984

FR Germanio: Franz Knöferl. Francio: Barbara Despiney. Israelo: Jehoŝua Tilleman; Josef Murĵan; Josifa Rabino. Nederlando: H.B. Snel.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Esperanto en radio

Ĉiujn informojn pri radio bonvolu sendi al la redaktoro de ĉi tiu rubriko: s-ro Georges Larglantier, 29 bvd. Murat, F-75016 Paris, Francio. Ĉi-sube estas la elsendhoroj laŭ la Universala Tempo (UTC), antaŭe nomata Grenviĉa Meza Tempo (GMT).

ĈIUTAGE

05.30-06.00 Varsovio, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz). Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00-950 Warszawa, Pollando.

11.00-11.25 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.50m (9525 kHz).

11.00-11.30 Pekino, 30.36m (9880 kHz), 19.87m (15100 kHz). Radio Pekino, Esperanto-fako, Beijing, Popola Respubliko Ĉinio.

13.00-13.30 Pekino, 25.67m (11685 kHz), 19.78m (15165 kHz).

15.30-15.55 Varsovio, 41.18m (7285 kHz), 31.01m (9675 kHz).

16.30-16.55 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).

19.30-20.00 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).

20.00-20.30 Pekino, 40.16m (7470 kHz), 30.10m (9965 kHz), 26.20m (11445 kHz).

21.30-21.55 Varsovio, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 49.22 (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).

22.30-23.00 Pekino, 26.05m (11515 kHz), 19.23 (15600 kHz).

DIMANĈE

05.45-05.57 Vieno, 50.46m (5945 kHz), 48.74m (6155 kHz), 30.71m (9770 kHz). O.R.F., Esperanto-fako, A-1136 Wien, Aŭstrio.

09.45-09.57 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 41.84m (7170 kHz).

19.00-19.10 Vatikano, 196m (1530 kHz), 48.47m (6190 kHz), 48.00m (6250 kHz),

41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.64m (11700 kHz), 19.84m (15120 kHz), kaj M.F. 93.0 MHz, 86.5 MHz. Radiovaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.

22.00-22.15 Rio-de-Janeiro, 214m (1400 kHz). Brazila Spiritisma Federacio, av. Passos 30, BR-20051 Rio de Janeiro (RJ), Brazilo.

LUNDE

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). Rádio Clube de Sorocaba, Esperanto-redakcio, Rua da Penha 455, BR-18100 Sorocaba (SP), Brazilo.

18.00-18.10 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz). Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

20.30-20.40 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz).

MARDE


21.45-22.00 Zagrebo, 262m (1143 kHz). Radio Zagreb, Esperanto-fako, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

ĴAŬDE

06.00-06.15 Vatikano, 186m (1611 kHz), 48.00m (6250 kHz), 41.38m (7250 kHz), 30.75m (9755 kHz), 25.61m (11715 kHz), 19.84m (15120 kHz).

18.00-18.10 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

20.30-20.40 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.



SABATE

18.00-18.10 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 30.90m (9710 kHz), 25.42m (11800 kHz). Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, I-00100 Roma Centro Corr., Italio.

20.30-20.40 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

Ĝis la reaŭdo!

ĜENERALA AŬDEBLECO

Tre multe da daŭraj aŭ ne-daŭraj aferoj povas helpi aŭ malhelpi la dissendadon de radiaj ondoj: vetero, sezono, parto de la tago, ĉirkaŭaĵo de la aŭskultanto, speco de ricevilo ktp. Tial ne eblas certigi, ĉu oni sukcesos klare ricevi elsendojn en sia lando aŭ mond-parto. Jen tamen kelkaj ĝeneralaj informoj:

a) Direktitaj ondoj. **Pekino**: 9880 kaj 15100 kHz al Japanio kaj Koreio; 11685 kaj 15165 kHz al Sudorienta Azio; 7470, 9965 kaj 11445 kHz al Eŭropo; 11515 kaj 15600 kHz al Centra kaj Suda Ameriko.

Vatikano: 9625, 11700 kaj 15120 kHz al Afriko je la 19.00 h. **Vieno**: 5945 kaj 9770 kHz al okcidenta Nord-Ameriko.

b) Nedirektitaj ondoj kapteblaj longdistance: ondoj ne listigitaj ĉi-supre sub a) el **Berno, Romo, Varsovio, Vatikano, Vieno, Zagrebo**.


c) Nur loka aŭskultebleco por **Rio-de-Janeiro, Sorocaba** kaj ĉiuj disaŭdigoj per modulita frekvenco (M.F.).

Ne sufiĉas nur aŭskulti!

Esperantaj radioelsendoj estas (aŭ povus esti) la plej regula kontakto kun la parola lingvo por la plimulto de esperantistoj. Vi ja scias, ke pasintjare okazis 3 623 tiaj elsendoj, kiuj daŭris 1 555 horojn. Tio signifas, ke oni ĉiutage povas aŭskulti Esperanton per radio dum pli ol kvar horoj. Provu foje! Ĉiuj detaloj troviĝas en la ĉi-supra tabelo. Konsciu ankaŭ, ke tiuj elsendoj dependas de sia populareco ĉe la aŭskultantoj. Pro tio:

Skribu foje al radio-stacio!

tibor sekelj



elpafu la sagon

uea 1983

Aperis nova volumo en la renoma Serio Oriento-Okcidento de UEA. Temas multrilate pri unika verko, kiu mankas al la plimulto de la naciaj lingvoj:

Tibor Sekelj

ELPAFU LA SAGON el la buŝa poezio de la mondo

Eldonis: Universala Esperanto-Asocio, 1983. 187 paĝoj, 21cm. Prezo: 27,00 gld. (broŝurita); 36,00 gld. (tole bindita), plus sendokostoj. Kutima triona rabato ĉe samtempa aĉeto de minimume tri ekzempleroj. Mendu ĉe la libroservo de UEA.

Esperanto und Wissenschaft Zur Plansprachenproblematik de Detlev BLANKE

Elstara informilo por lingvosciencistoj. Informriĉa germanlingva skizo, kiu science traktas planlingvojn, interlingvistikon, la planlingvon Esperanto, kun bibliografioj de sciencaj verkoj.

Eld. Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, Berlino, 1982 (represo). 88p. 21cm. Prezo: 12,00 gld. de Libroservo de UEA (plus sendokostoj; rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj).


John Wells: *Lingvistikaj aspektoj* *de Esperanto*

Rotterdam: UEA/CED, 1978. 76p. 23cm. ISBN 92 9017 021 2. Scienca analizo de la lingvistikaj aspektoj de Esperanto: fonetiko, morfologio, sintakso, leksiko kaj semantiko. Kun bibliografio kaj indekso de terminoj. Prezo: 12,00 gld.

Éva Tófalvi & Oldřich Kníchal **Kiuĵ semas** **plorante...**

Nova originala romano en Esperanto! Ĝi gajnis la prestiĝan Premion Raymond Schwartz en 1980. Ĝi estas psikologie teksita intima rakonto, kvazaŭ taglibro de la protagonisto, kiu erarvagas sub influo de la faŝisma ideologio. En tre sukcesa grafika prizorgo de Franko Luin; kontraŭ aparte favora prezo:

Eldonis: Universala Esperanto-Asocio, 1984. 107p. 21cm. ISBN 92 9017 029 8. Prezo: 15,00 gld.



La vivo de d-ro L.L. Zamenhof en bildoj



Aperis 128-paĝa, grandformata (A4), bildlibro per kiu Henk Thien (fondinto kaj prizorganto de la Foto-Servo pri Zamenhof) kondukas vin tra la vivo de la iniciatinto de Esperanto. 114 nigrablankaj fotoj kaj 25 mapoj, ĉio kronologie aranĝita kaj prikomentita. La libro celas esti utila dokumento el kiu oni facile povas represi la materialon aŭ utiligi ĝin alimaniere.

Prezo: 30,00 (por Nederlando 31,50) guldenoj, plus sendokostoj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA, kiu estas la sola distribuanto kaj donas trionan rabaton por ĉiu samtempa mendo de minimume tri ekzempleroj.

KSM

Se vi serĉas seriozajn korespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejoj), turnu vin al la

Koresponda Servo Mondskala de UEA

Adreso: KSM, p/a s-ro R. Llorens,

121 bis, Bd. Napoléon III, F-06200 Nice, Francio.

SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ

interesiĝas pri universitatnivelaĵoj kursoj. Kompetentaj universitatanoj bonvolu fari proponon pri temo kaj datoj (dum julio-aŭgusto 1985) al la sekretario de SUK: **José Jacob, B.P. 62, LIEGE X, Belgio.**

Bonvolu noti, ke 33 eldonitaj kursotekstoj (KT) kaj 4 kajeroj (KJ) estas disponeblaj. Mendu la liston je la sama adreso.

ALVOKO AL INTERESITOJ: Por ricevi – senpage – Esperantajn broŝurojn pri Bibliaj temoj, legado-projekton, ankaŭ studkurson, skribu tuj al: **Internacia Biblio-Misio, 29 Plantation Road, Poole, Britujo BH17 7LN;** aŭ, se ekster Eŭropo, al **P.O. Box 373, Boronia, 3155 Vic., Aŭstralio.**


ĈU VI KONAS LA TERON?

Ĉapitroj el la geologiaj sciencoj

Altnivela enkonduko en la geologion, la plej grava kaj ampleksa antaŭenpaŝo sur la kampo de tiu scienco en la Internacia Lingvo.

Ĉi tiu longe atendita libro pri la geologio estas originale verkita en Esperanto de d-ro Endre Dudich kaj eldonita de Scienca Eldona Centro de UEA, Budapeŝto.

Endre Dudich traktas en populariga maniero tra 12 ĉapitroj ĉiujn subbranĉojn de la geologio, i.a. la mineralogion, paleontologion, terhistorion, geofizikon kaj kosmogeologion. Ĉiun ĉapitron akompanas abundaj figuroj kaj tabeloj, kiuj vivigas kaj klarigas la tekston. Fine de la libro troviĝas faka leksikoneto kaj listo de literaturo.



150 paĝoj plus 60 paĝoj da scienc-teknikaj anoncoj. Formato 23cm. ISBN 963 571 080 1. Por la elstare alloga prezo de **nur 12,00 gld.** (plus sendokostoj; rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj) de la sola distribuanto: Libroservo de UEA.